

# ESPERANTO INTERNACIA

Monata organo de la Internacia Esperanto - Ligo

Vol. 2, N-ro 2

Februaro 1938

Eldonanto : Internacia Esperanto-Ligo,  
Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

Adreso de la Redakcio : Teo JUNG  
Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

## La nova Konkurso de I.E.L.

**Celo por 1938 : 15000 membroj, inter ili 4000 individuaj**

La Internacia Konkurso de IEL por 1937 elvokis tiom da intereso, ke la Komitato dum la kunsidoj en Varsovio decidis aranĝi similan Internacian Konkurson ankaŭ por la jaro 1938, sed kun kelkaj ŝanĝoj. Por la nuna jaro, do, validas la jenaj reguloj :

1. Por ĉiu membro, aliĝinta al IEL, estas donitaj (resp. donotaj) poentoj laŭ jena tabelo :

Asocia Membro . . . . .	1
Membro kun Jarlibro . . . . .	5
Membro-Abonanto . . . . .	10
Membro-Abonanto-Heroldo . . . . .	12
Membro-Subtenanto . . . . .	15
Dumviva Membro (nova) . . . . .	50
Patrono . . . . .	50
Entrepreno . . . . .	10

2. La elirbazo estas la stato je la fino de 1937, laŭ jena tabelo:

Afriko . . . . .	137	Jugoslavujo . . . . .	257
Aŭstralio . . . . .	429	Kanado . . . . .	74
Aŭstrujo . . . . .	789	Latvujo . . . . .	55
Azio . . . . .	1321	Litovujo . . . . .	135
Belgujo . . . . .	1722	Nederlando . . . . .	2837
Britujo . . . . .	6483	Norvegujo . . . . .	792
Bulgarujo . . . . .	92	Novzelando . . . . .	265
Ĉeĥoslovakujo . . . . .	2449	Polujo . . . . .	318
Danujo . . . . .	1118	Portugalujo . . . . .	317
Finnlando . . . . .	61	Rumanujo . . . . .	50
Franco . . . . .	5907	Sud-Ameriko . . . . .	851
Grekujo . . . . .	137	Svedujo . . . . .	3024
Hungarujo . . . . .	619	Svislando . . . . .	137
Italujo . . . . .	636	Usono . . . . .	1513

3. Al la aliĝinta Landa Asocio en la lando aŭ regiono, kiu montros la plej bonan progreson dum la jaro, kompare kun la supraj ciferoj, IEL donos premion de £ 10/- (200 svisaj frankoj) kaj artan diplomon. Se en tiu regiono estos pli ol unu aliĝinta Landa Asocio, la premio estos dividata inter ili.

Plue, al ĉiu Delegito en la koncerna regiono ni sendos libro-premion.

IEL rigardas al la estonteco kun plena fido kaj espero. Bone enfluas la membrotizoj por la nova jaro, kaj jam en la unua semajno de januaro oni registris pli ol cent novajn individuajn membrojn. La minimuma celo por 1938 estu 15,000 membroj, el kiuj almenaŭ 4,000 estu individuaj membroj. Per la bonvola helpo de ĉiuj delegitoj kaj membroj tiuj ciferoj certe estos facile atingeblaj.

## Rezulto de la Konkurso 1937

Sube troviĝas la finaj ciferoj de tiu ĉi konkurso, kiu vekis tiom da intereso ĉe la esperantistaro. Ni kore gratulas Norvegan Esperantistan Ligon, kaj ĉiujn en Norvegujo, kiuj kunhelpis en la atingo de la premio. Tiu premio, kiun donas IEL, konsistas el £ 10 (200 sv. fk.) al la

Norvega Ligo kaj havinda libro-premio por ĉiu Delegito en Norvegujo.

Ni gratulas ankaŭ precipe tiujn landojn, kiuj atingis, aŭ preskaŭ atingis, 100 % en la konkurso — bondezirojn al tiuj, efektive al ĉiuj, pri la nova konkurso por la nuna jaro !

POENTOJ			
	1935	1937	%
1. Norvegujo	120	792	660.0
2. Aŭstrujo	255	789	309.4
3. Danujo	585	1118	191.1
4. Hungarujo	490	619	126.3
5. Nov-Zelando	210	265	126.2
6. Grekujo	110	137	124.2
7. Bulgarujo	75	92	122.6
8. Usono	1264	1513	119.7
9. Italujo	560	636	113.6
10. Svedujo	2984	3024	101.3
11. Britujo	6469	6483	100.2
12. Aŭstralio	470	429	91.3
13. Litovujo	150	135	90.0
14. Sud-Ameriko	1025	851	83.0
15. Belgujo	2081	1722	82.7
16. Azio	1615	1321	81.8
17. Portugalujo	395	317	80.3
18. Franco	7909	5907	74.7
19. Kanado	100	74	74.0
20. Ĉeĥoslovakujo	4040	2449	60.6
21. Nederlando	4815	2837	58.9
22. Polujo	685	318	46.4
23. Jugoslavujo	615	257	41.8
24. Afriko	395	137	34.7
25. Finnlando	195	61	31.3
26. Latvujo	265	55	20.3
27. Rumanujo	400	50	12.5
28. Svislando	1410	137	9.7
29. Estonujo	130	5	3.8
30. Hispanujo	2080	15	0.7
<b>Sumo</b>	<b>41897</b>	<b>32545</b>	<b>77.9</b>
			<b>Meza %</b>

# 13500 membroj de IEL en 60 landoj

**optimiste laboras por progresigi  
nian aferon en la tuta mondo.**

Membroj pagintaj ĝis la 31-a de Decembro 1937.

	AM	MJ	MA	MAH	MS	Pat.	DM	HM	SUMO
Acoroj	—	—	1	1	—	—	—	—	2
Angolo	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Argentino	—	13	17	—	8	—	—	—	38
Aŭstralio	—	4	34	2	3	—	1	—	44
Aŭstrujo	175	44	32	2	—	—	2	1	256
Belgujo	347	29	95	15	6	—	3	1	496
Borneo	—	—	—	—	—	—	1	—	1
Brazilo	88	8	18	6	—	—	—	—	120
Britujo	1467	256	173	48	58	10	18	4	2034
Bulgarujo	—	8	4	1	—	—	—	—	13
Ĉeĥoslovakujo	800	96	77	27	5	—	2	1	1008
Ĉinujo	—	—	4	—	—	—	—	—	4
Danujo	700	16	24	3	2	—	1	1	747
Egiptujo	—	5	3	—	—	—	1	—	9
Estonujo	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Finnlando	—	1	2	3	—	—	—	—	6
Francujo	2598	240	151	16	14	3	13	11	3046
Germanujo	—	2	3	—	—	—	2	—	7
Gibraltaro	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Grekujo	100	1	2	1	—	—	—	1	105
Havaja Ins.	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Hindoĉinujo	—	1	1	—	—	—	—	—	2
Hindujo	—	1	1	1	—	—	—	—	3
Hispanujo	—	1	1	—	—	—	2	1	5
Hungarujo	100	23	26	12	—	—	1	2	164
Hongkongo	—	—	—	1	—	—	—	—	2
Irano	—	1	—	—	1	—	—	—	2
Islando	—	—	2	1	—	—	—	—	3
Italujo	303	13	13	9	2	—	4	2	346
Japanujo	600	26	17	2	3	—	—	—	648
Jugoslavujo	—	13	12	6	—	—	—	—	31
Kanado	—	2	4	2	—	—	—	—	8
Kenja Kolonio	—	—	1	—	—	—	1	—	2
Kolombio	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Latvujo	—	5	3	—	—	—	—	—	8
Liftenstejno	—	1	—	—	—	—	—	—	1
Litovujo	—	2	11	—	1	—	—	—	14
Luksemburgo	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Madeiro	—	—	2	—	—	—	—	—	2
Maroko	—	1	—	1	—	—	—	—	2
Meksiko	—	—	1	—	—	—	—	—	1
Monako	—	3	1	—	—	—	—	—	5
Nederlandindio	—	2	9	2	2	—	—	—	15
Nederlando	1200	107	61	26	12	—	3	—	1409
Norvegujo	473	43	8	2	—	—	—	—	526
Nov-Zelando	—	40	5	—	1	—	3	—	49
Palestino	—	5	3	1	—	—	—	—	9
Papuo	—	—	—	—	—	—	2	—	2
Polujo	—	33	9	4	1	—	2	1	50
Portugalujo	—	2	18	5	1	—	1	—	27
Rodezio	—	—	2	—	—	—	—	—	2
Rumanujo	—	4	3	—	—	—	—	—	7
Sovet-Unio	—	—	1	—	—	—	1	—	2
Sud-Afriko	—	2	2	1	—	—	—	—	5
Svedujo	1691	82	57	24	1	—	1	1	1857
Svislando	—	4	4	1	4	—	4	1	18
Trinidado	—	—	—	1	—	—	—	—	1
Turkujo	—	1	—	1	—	—	1	—	3
Urugvajo	—	—	7	1	—	—	—	—	8
Usono	148	49	72	20	10	—	5	3	307
<b>60 landoj</b>	<b>10790</b>	<b>1192</b>	<b>100</b>	<b>250</b>	<b>135</b>	<b>13</b>	<b>75</b>	<b>31</b>	<b>13487</b>

## En Brazilo

grava federacio enkondukis Esperanton en sian kulturprogramon kaj ĝin grandskale propagandas.

Nia diligenta kolegaro en Brazilo ne dormis dum la jubilea jaro ! Prospektoj, jubilea poŝtmarko, afiŝoj, libroj, gazet-artikoloj, novaj gazetoj ktp. montras ke oni vere kaj energie laboris en tiu granda sudamerika respubliko.

En la propagando oni devas menciĝi kiel elstaran sukceson la oficialan alprenon de Esperanto faritan de *Federação Espirita Brasileira*. Tiu grava Federacio jam en sia raporto pri la socia jaro finita la 30.6.1937 (1.7.1936 ĝis 30.6.1937) anoncis sian decidon, oficiale propagandi kaj helpi la disvastigon de nia lingvo, kaj la faktoj konfirmis tiun decidon, ĉar la oficiala organo de la Federacio regule presis artikolojn kaj informojn pri Esperanto dum la cetera duonjaro, kaj fine fermis sian 55-an jar-kolekton per speciala numero pri D-ro Zamenhof kaj Esperanto. Ĝia eldona fako presis lernolibron kaj belan propagandan katalogon. Ĝia librovendejo malfermis riĉan fakon de libroj pri kaj en Esperanto. En ĝia oficiala katalogo aperas kiel propraj eldonoj tri libroj pri nia lingvo kaj anonco de speciala katalogo; en tagjurnaloj kaj radioprogramoj aperas anoncoj pri ĝiaj Esperantaĵoj, ktp.

La konkero de tiu grava Federacio estis dezirata kaj vigle prilaborata dum 25 jaroj; sed ĝia granda morala respondecigo igis la direktoraron prokrasti ĉiam kun granda prudento por eviti eble facilaniman decidon alpreni lingvon internacian ankoraŭ malfortan, kies estonteco ne estis (laŭ ilia opinio) absolute certa. La 50-jara ekzisto de Esperanto kaj ĝia ĉiam kreskanta literaturo fine decidigis la estraron de la Federacio aprobi nian lingvon kaj enkonduki ties propagandon en sian laborprogramon por la estonteco.

La 53-jara senĉesa progresado de tiu Federacio, kies ĉefoficejo okupas nun tri domegojn en la koro mem de nia ĉefurbo (Avenuo Passos, 28, 30 kaj 32) kaj kies filioj floras en ĉiuj urboj de la lando, estas sufiĉe grava garantio por la estonteco de Esperanto en Brazilo, Ekonomie kaj morale la Federacio estas sufiĉe forta por defendi nian lingvon kaj idealon ne nur sur la tuta brazila teritorio, sed ankaŭ en aliaj landoj.

La libroreto por disvendado de ĝiaj eldonaĵoj atingas la tutan landon kaj de nun disvendas ankaŭ Esperantaĵojn.

Al mi ŝajnas, ke de nun la estonteco de nia lingvo staras neŝancelebla en la brazila lando!

Ismael Gomes Braga.

# Internacia Esperanto - Ligo

Centra Oficejo: Heronsgate, Rickmansworth, (Herts.), Anglujo.

## Oficiala Informilo

**N-ro 60. 30-an de Decembro, 1937**

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Ceĥoslovakujo.

**Altrohlaŭ** (Bohemio). — D: J. Hajek, N-ro 336, apud Karlsbad.

**Praha.** — FD. (Hotel-industrio): E. Urban, Kloboucnická 1045/III, Praha XIII.

#### Jugoslavujo.

**Bac. Topola.** (Dun. Ban.) — D: J. Kmečko, Vojvode Vuka ul. 11.

**Knjazevac** (Moravska Ban.). — D: R. Milenkovic, Bozinovice 21.

**Osijek** (Savska Ban.). — FD.: (Muziko, metalurgio): La D. — L. Friczky, Beogradska ul. 34.

#### Nederlandindio.

**Serbelawan** (Sumatra). — D: H. J. Tuinder, Ondern. « Laras ».

#### Polujo.

**Cieszyn** (Silezio). — Nova D: R. Kubalok, Po-koju 2.

VD: J. Nowicki, Hazlaska 2.

**Luck** (Wolyn). — D: M. Jermolajev, Skrz. poczt. 12.

#### Usono.

**Berkeley** (California). — D: P. Parker, 2607, Piedmont Avenue.

**Bryan** (Texas). — D: F-ino P. Stoneham, 405, S. Houston.

**Fort Bragg** (California). — D: R. Colquhoun, Box 716.

### ŜANĜOJ.

#### Aŭstrujo.

**Amsteten.** (N.Ö.). — D: J. Biberauer, Schulstrasse 20.

#### Nederlandindio.

**Pematang Siantar.** — D. translok. al Serbelawan, — vidu supre.

#### Usono.

**Litle Rock** (Arkansas). — D. Nova Adr.: Kap. F. A. Post-Nikov, Box 447, Rte 5.

### MEMBRO-SUBTENANTOJ, 1938.

- 29. J. De Maeyer, Nivelles, Belgujo.
- 30. S. C. Eby, New York, Usono.
- 31. W.W. Carpenter, Escondido, Usono.
- 32. S-ino M. Klimaševska, Taurage, Litovujo.
- 33. R. Milenkovic, Knjazevac, Jugoslavujo.
- 34. J. Kozlevčar, Ljubljana, Jugoslavujo.

### UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO, 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ 680 el 25 landoj.

C. C. GOLDSMITH,  
Generala Sekretario.

## Oficiala Informilo

**N-ro 61. 5-an de Januaro, 1938.**

### NOVA DELEGITO.

#### Argentino.

**Santa Fe.** — D: H. C. Díaz, Francia 3314.

### ŜANĜOJ.

#### Finnlando.

**Viipuri.** — VD. (Nova adr.): H. Koivu, Pelleronkatu 10-B-12.

**Oslo.** — D. (Nova adr.): R. Bugge-Paulsen, Dunkers-gt. 3-II.

### MEMBRO-SUBTENANTOJ.

- 35. G. L. Preedy, Caversham, Anglujo.
- 36. W. Bailey, Penrhyn Bay, Kimrujo.
- 37. W. Norris-Jones, Dartmouth, Anglujo.
- 38. F. Archer, Hobart, Aŭstralio.
- 39. J. W. Hartley, Burnley, Anglujo.
- 40. Gen. G. Kyffin-Taylor, Birkenhead, Angl.
- 41. G. Bevan, Wrexham, Anglujo.
- 42. H. W. Smith, Watford, Anglujo.
- 43. C. Barnes, Colchester, Anglujo.

### MONATA STATISTIKO.

#### Membraro.

Jen la stato de la pagitaj kotizoj ĝis la fino de la jaro 1937:

Asociaj Membroj . . . 10790

Individuaj Membroj:

MJ . . . . .	1192
MA . . . . .	1001
MAH . . . . .	250
MS . . . . .	135
DM . . . . .	75
HM . . . . .	31
Patronoj . . . . .	13

2697

**13487** en 60 landoj.

#### Korespondajoj.

Centra Oficejo (sen la gazetoj) dum Decembro, 1937:

Ricevitaj . . . . .	956
Senditaj . . . . .	998

**1954**

### CENTRA OFICEJO — KORESPONDAJOJ DUM LA JARO 1937

(sen la gazetoj)

Ricevitaj . . . . .	8616
Senditaj . . . . .	18627

**27243**

### UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ 825.

C. C. GOLDSMITH,  
Generala Sekretario.

## Oficiala Informilo

**N-ro 62. 13-an de Januaro, 1938.**

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Belgujo.

**Viersel.** — D: E. Seghers, Kerkstraat 2.

#### Britujo.

**Birmingham.** — D: (Nova) F. C. Clewlow, 14, Queslett Road, Birmingham 22.

**Formby** (Lancashire). — D: B. O. Price-Heywood, Crabtree, Timms Lane.

**Maidenhead** (Berkshire). — D: E. W. Sloper, 24, Sperling Road, Moor Lane.

**Leighton Buzzard** (Bedfordshire). — D: J. W. Holland, 61, Vandyke Road.

**Manchester.** — VD: J. W. Pichard, 5, Ackroyd Avenue, Gorton.

**Rochester** (Kent). — D: F. H. Turner, « The China Dog », East Row.

FD. (Aviado): La D.

**Sheffield.** — FD. (Transportistaj aferoj): H. Bramwell, 67, Sycamore House Road, Shiregreen.

**Slough** (Buckinghamshire). — D: R. F. Jervis, 54, Lynwood Avenue.

**Wallasey** (Cheshire). — D: F-ino C. Leadley-Brown, 21, Egremont Parade.

### Ceĥoslovakujo.

**Böhmisch Leipa** (Bohemio). — VD: K. Beloušek, Gaspasse.

#### Danujo.

**Gesten** (Jylland). — D: H. Mathiesen, «Esters-minde».

#### Francujo.

**Chauny** (Aisne). — D: A. Guraud, 37bis, Rue de la Paix.

#### Grekujo.

**Thessaloniki.** — D: N. Dragonas, Ethotrapeza, Nacia Banko.

#### Hispanujo. (Katalunujo)

**Barcelona.** — VD: F. Montserrat-Boronat, Provenca 75, 2-a.

**El Vendrell** (Tarragona). — D: F. Guitart Janner, Str. Doctor Robert 46.

VD: J. Marcé Mercadé, Str. Major 10.

#### Norvegujo.

**Jörpeland** (Rogaland). — D: T. Müller.

#### Polujo.

**Katowice** (Silezio). — D: M. Kloss, ul. Wawelska 3 m. 5.

#### Portugalujo.

**Aljustrel** (Alentejo). — D: F. A. Rasquinho Junior.

### ŜANĜO.

#### Britujo.

**York.** — Provizore ne estas D. pro translokiĝo.

### MEMBRO-SUBTENANTOJ.

- 44. P. Th. Justesen, Fannerup, Danujo.
- 45. G. Gordon, Christchurch, Nov-Zelando.
- 46. F-ino S. W. Bloemendal, Lochem, Nederl.
- 47. F-ino B. Bowier, Den Haag, Nederlando.
- 48. S-ino M. E. Korndörffer, Den Haag, Ned.
- 49. S-ino M. O'Brien Harris, London, Anglujo.
- 50. F. E. Wadham, Epsom, Anglujo.
- 51. M. Pearson, Sheffield, Anglujo.
- 52. F-ino E. M. Bartholomew, Letchw., Angl.
- 53. D-ro G. T. Knol, Coevorden, Nederlando.
- 54. W. Baaten, Utrecht, Nederlando.

C. C. GOLDSMITH,  
Generala Sekretario.

## Oficiala Informilo

**N-ro 63. 20-an de Januaro, 1938.**

### NOVA KOMITATANO.

Kiel Komitatanon por Jugoslavujo elektis Jugoslavvia Esperanto-Ligo:  
D-ron Iva Lapenna, Zagreb.

### NOVAJ DELEGITOJ.

#### Danujo.

**Aarhus.** — FD. (Fervojistaj aferoj): S. Sørensen, Bruunsgade 46.

#### Finnlando.

**Veteli.** — D: K. Savola, Heikkita.

#### Jugoslavujo.

**Delnice.** — Nova D: J. Lisac, Supilova ul. 170.

**Dubrovnik.** — FD. (Paca Movado): J. Dittrich.

**Zagreb.** — FD. (Arbaro-tekniko): I. Godek, Petrova 145.

FD. (Komerco): F. Slogar, Slovenska ul. 9-II.

#### Latvujo.

**Liepaja.** — VD: J. Plucejs, Augustes iela 17, dz. 4.

FD. (Sociaj aferoj): A. Muzikants, Kara Ostas darbuicās.

FD. (Turismo): F-ino L. Lange, Lacu 17, dz. 6.

(Daŭrigo vidu sur paĝo 20!)



### Oficiala Informilo N-ro 2.

**Adreso por leteroj.** — Sekretario, 30a Universala Kongreso de Esperanto, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.), Anglujo.

**Kongresejo.** — University College, Universitato de Londono.

La Interkoniga Vespero okazos en Wharncliffe Rooms, Great Central Hotel, tute apud Marylebone Stacidomo.

La Oficiala Inaŭguro estos en Dominion Theatre, Tottenham Court Road; belega konstruaĵo kun loko por kreskaŭ 3,000 personoj.

La balo okazos en Alexandra Palace en norda Londono.

**Kotizoj.** — Ĝis 31.3.38, £ 1-5-0; post 31.3.38, £ 1-10-0. La edzo aŭ edzino de kongresano, kaj gejunuloj ne pli ol 20-jaraj, pagas la duonon de ĉi tiuj sumoj. Estas oportune sendi kotizojn en registrita letero per britaj ŝtataj monbiletoj, haveblaj ĉe bankoj kaj monŝanĝejoj en multaj urboj. Se oni sendas pagojn per poŝtmandatoj, oni ĉiam sendu samtempe informon pri la nomo kaj adreso de la sendinto kaj la celo de la pago, ĉar la brita poŝtadministracio ne skribas mesaĝojn sur poŝtmandatoj. La poŝtĉekonta sistemo ne ekzistas en Britujo. Ĉekoj kaj aliaj pagiloj estu payable al Internacia Esperanto-Ligo.

**Blinduloj.** — Blinduloj kaj ties gvidantoj ricevos kongreskartojn senpage, sed iliaj aliĝoj devas esti aprobitaj de s-ro W. P. Merrick (kasisto de la Blindula Ligo), Penso, Shepperton, Middlesex, Anglujo.

**Aliĝiloj.** — Nun haveblaj ĉe la kongresoficejo, kaj ĉe la ĉefaj gazetoj kaj Landaj Asocioj.

**Donacoj.** — La Organiza Komitato volonte ricevos donacojn por helpi al la plena sukceso de la Kongreso. Donacoj jam ricevitaj £ 10. 17 ŝ. 3 p.

**Blindula Kaso.** — La Organiza Komitato

(Daŭrigo de sur paĝo 19.)

#### Maroko.

**Casablanca.** — FD. (Komerco): R. Abitbol, 206, Blvd. de la Gare.

#### Nederlando.

**Haarlem.** — VD: G. J. B. Bontje, Bloemveldlaan 16.

#### Polujo.

**Swieciany (Wil.)** — D: M. Stankiewicz, ul. Lyntupska 34.

#### Usono.

**Peoria (Illinois).** — D: A. S. Mellichamp, 518, Millman Street.

**San Francisco (California).** — D: B. F. Ames, 309, De Young Building.

**San Pedro (California).** — D: J. G. Van Zandt, 995, 14th Street.

#### MEMBRO-SUBTENANTOJ.

55. T. L. C. Enderby, Wellington, Aŭstralio.  
56. E. Dodge, Washington, Usono.  
57. D-ro J. Gian-Franceschi, Buffalo, Usono.  
58. F. Weeke, Den Haag, Nederlando.  
59. S-ino B. Blankensteijn, Vianen, Nederlando.  
60. T. Postma, Rotterdam, Nederlando.  
61. G. A. Connor, New York, Usono.

#### UNIVERSALA KONGRESO, LONDONO, 1938.

Aliĝoj ĝis hodiaŭ 896 el 25 landoj.

C. C. GOLDSMITH,  
Ĝenerala Sekretario.

volonte ricevos donacojn por ebligi, ke blinduloj partoprenu la Kongreson. Jam ricevita £ 17. 19 ŝ. 2 p.

**Loĝado.** — Kiel eble plej baldaŭ oni dissendos loĝmendilojn. Intertempe, povas esti, ke la jena informo utilos:

Hoteloj: lito kun matenmanĝo, po 4,5 ĝis 14 ŝilingoj ĉiutage. (Alilandanoj notu, ke la angla matenmanĝo estas iom ampleksa.)

Oni ankaŭ esperas aranĝi pli malkarajn loĝejojn.

La Organiza Komitato ne garantios loĝejon al iu ajn kongresano, kies aliĝilon ĝi ne estos ricevinta antaŭ la 1a de julio.

**Fakaj kunvenoj.** — Organizantoj bonvolu anonci frue siajn dezirojn.

**Oficiala organo.** — Ĉiu kongresano ricevos la gazeton « The British Esperantist » de ja-

nuaro ĝis julio, kaj poste la numeron, kiu enhavas la raporton pri la Kongreso.

**Presajoj.** — En la kongresejo kaj kongresaj kunvenoj oni rajtos disdoni cirkulerojn kaj ĉiajn aliajn presajojn nur post antaŭa aprobo de la kongresa komitato.

**Dokumentaro.** — La sama postulo rilatas al presajoj disdonataj kun la oficialaj kongresdokumentoj; tio estas, ili devos ricevi la antaŭan aprobon de la komitato kaj devos alveni ĉe adreso indikota, plej malfrue du semajnojn antaŭ la kongreso.

**Flegistino.** — Esperanto-parolanta flegistino deĵoros en la kongresejo kaj ĉe ĉiuj gravaj aranĝoj.

**Membraro.** — Ĝis la hodiaŭa dato (6.1.1938) aliĝis al la kongreso 825 personoj el 25 landoj. Por la Organiza Komitato, Cecil C. GOLDSMITH, Sekretario.

## Kvina listo de kongresanoj

501. J. L. Mackenzie, Newport, Anglujo.  
502. G. H. Benthall, Preston, Anglujo.  
503. N. Mahrus, Fayoum, Egiptujo.  
504. F-ino L. M. Deane, Wimborne, Anglujo.  
505. M. D. Dupuis, Paris, Francujo.  
506. M. Verraes, Newcastle-on-Tyne, Anglujo.  
507. H. Tingey, London, Anglujo.  
508. J. Muusses, Purmerend, Nederlando.  
509. J. Glück, Amersfoort, Nederlando.  
510. S-ino B. Warnes, Hamar, Norvegujo.  
511. F-ino C. Waller, Bournemouth, Anglujo.  
512. S-ino M. De Rycke, Gand, Belgujo.  
513. C.H.H. Satchell, Eastbourne, Anglujo.  
514. S-ino S.S. John, Budapest, Hungarujo.  
515. B. Cooper, Borås, Svedujo.  
516. J. R. Chapellier, Auboué, Francujo.  
517. F. W. Buenting, Bruxelles, Belgujo.  
518. H.J. Zigmund, Bruxelles, Belgujo.  
519. W. A. Cather, Torquay, Anglujo.  
520. S. T. Fuller, Brighton, Anglujo.  
521. E. F. Usher, London, Anglujo.  
522. H. G. Brown, Ilford, Anglujo.  
523. G. Pamphilon, London, Anglujo.  
524. F-ino C. D. Cameron, Edinburgh, Skoti.  
525. J. W. Mann, Leeds, Anglujo.  
526. F-ino A. Robb, Edinburgh, Skotlando.  
527. A. E. Gray, Ruislip, Anglujo.  
528. D-ro L. Rosenstock, Krakow, Polujo.  
529. F-ino N. P. Duncan, Edinburgh, Skotl.  
530. F-ino P. W. van Sijn, Den Haag, Nederl.  
531. F-ino A.K.J. Stephens, Leigh-on-Sea, A.  
532. F-ino E.A. Stephens, Leigh-on-Sea, Angl.  
533. H. Benson, Blackburn, Anglujo.  
534. A. Joly, Besançon, Francujo.  
535. F-ino L. Frankenburg, Sunderland, Angl.  
536. D-ro D. R. Duncan, London, Anglujo.  
537. S-ino E. B. Duncan, London, Anglujo.  
538. C. B. Jefferies, Birmingham, Anglujo.  
539. W. Tarr, Leigh-on-Sea, Anglujo.  
540. S-ino E. Tarr, Leigh-on-Sea, Anglujo.  
541. J. Farrand, Doncaster, Anglujo.  
542. S-ino E. Farrand, Doncaster, Anglujo.  
543. F-ino E. Pullan, Huddersfield, Anglujo.  
544. S-ino A. L. Pullan, Huddersfield, Angl.  
545. T. H. Ridpath, London, Anglujo.  
546. G.M. Hayton, Platt, Anglujo.  
547. W. R. Mackay, Ilford, Anglujo.  
548. V. Grimmitt, London, Anglujo.  
549. S-ino S. Grimmitt, London, Anglujo.  
550. J.G. Kinniburgh, St. Margarets, Anglujo.  
551. L. C. Allsworth, North Cheam, Anglujo.  
552. S-ino D. A. Allsworth, North Cheam, A.  
553. F-ino W. McEldon, London, Anglujo.  
554. A.W. Smith, Beckenham, Anglujo.  
555. S-ino D.B. Smith, Beckenham, Anglujo.  
556. F-ino D.M.K. Hancock, London, Anglujo.  
557. W. S. Clark, London, Anglujo.  
558. S-ino H. W. Clark, London, Anglujo.  
559. F. Clark, London, Anglujo.  
560. F-ino E. Clark, London, Anglujo.  
561. D. T. Warren, London, Anglujo.  
562. F-ino I. D. B. Brown, London, Anglujo.  
563. H. C. Groen, Ilford, Anglujo.  
564. W. A. Bryant, London, Anglujo.  
565. S-ino G. Amos, Pinner, Anglujo.  
566. W. Kok, Rotterdam, Nederlando.  
567. E. Lawrence, Leeds, Anglujo.  
568. H. Milsom, Harrow, Anglujo.  
569. S. H. Larking, London, Anglujo.  
570. F-ino E. Weir, Bournemouh, Anglujo.  
571. F. D. Murphy, Ipswich, Anglujo.  
572. A. Lodema, Antwerpen, Belgujo.  
573. S. C. Eby, New York, Usono.  
574. S-ino C. L. Eby, New York, Usono.  
575. A. Gremillet, Nancy, Francujo.  
576. S-ino H. Gremillet, Nancy, Francujo.  
577. C. Stoeckert, New York, Usono.  
578. S-ino M. A. Rougier, Marseille, Francujo.  
579. G. Saurin, Marseille, Francujo.  
580. R. J. Hurrion, London, Anglujo.  
581. F-ino A. E. Baxter, Orpington, Anglujo.  
582. S-ino L. Vanhersecke, Coudekerque-branche, Francujo.  
583. J. Ghienne, Dunkerque, Francujo.  
584. S-ro Degand, Dunkerque, Francujo.  
585. F-ino G. Spyns, Dunkerque, Francujo.  
586. J. A. Bergvall, Härnösand, Svedujo.  
587. F-ino L. Cooper, Borås, Svedujo.  
588. F-ino J. Aronsson, Torshälla, Svedujo.  
589. F-ino K. Walden, Ystad, Svedujo.  
590. S-ino L. Malmgren, Stockholm, Svedujo.  
591. F-ino C. E. I. Roome, Sheffield, Anglujo.  
592. A. Hayes, Southsea, Anglujo.  
593. S-ino M. E. Hayes, Southsea, Anglujo.  
594. C. B. Morgan, Brightlingsea, Anglujo.  
595. F-ino H. Wight, Edinburgh, Skotlando.  
596. F-ino A. G. Wight, Edinburgh, Skotlando.  
597. F-ino M. C. Wilkie, Edinburgh, Skotlando.  
598. T. Woolfenden, Rochdale, Anglujo.  
599. H. Couteaux, Paris, Francujo.  
601. J. F. Kelly, Carshalton, Anglujo.  
602. P. Ecker, Ockbrook, Anglujo.  
603. F-ino M. Crispin, Southend-on-Sea, Angl.  
604. F-ino D. M. Asbee, Oxford, Anglujo.  
605. C. P. Ormerod, Chorley, Anglujo.  
606. S-ino M. Ormerod, Chorley, Anglujo.  
607. G. J. Bury, Liverpool, Anglujo.  
608. S-ino G. Bury, Liverpool, Anglujo.  
609. Prof. W. E. Collinson, Liverpool, Anglujo.  
610. F-ino I. L. F. Skinner, Seven Kings, Angl.  
611. F-ino N. Stevenson, Duddingston, Skotl.  
612. F-ino E. Stevenson, Duddingston, Skotl.  
613. F-ino J. K. Scott, Edinburgh, Skotlando.  
614. J. Turnbull, Bristol, Anglujo.  
615. S-ino L. Koroma, Somero, Finnlando.  
616. S-ino A. I. Turnbull, Bristol, Anglujo.  
617. P. De Filippo, Napoli, Italujo.  
618. D-ro I. Lapenna, Zagreb, Jugoslavujo.  
619. S-ino v. d. Wielen, Nijmegen, Nederl.  
620. C. M. Cather, Port Said, Egiptujo.

621. S-ino K. B. Cather, Port Said, Egiptujo.  
 622. J. L. C. Shrewsbury, Warrington, Angl.  
 623. R. Wright, Cheam, Anglujo.  
 624. S-ino V. Wright, Cheam, Anglujo.  
 625. E. Lentz, Aberdeen, Skotlando.  
 626. C. E. Jacklin, Hull, Anglujo.  
 627. S-ino E. E. Jacklin, Hull, Anglujo.  
 628. A. E. Smith, Ketering, Anglujo.  
 629. L. Friis, Aabyhøj, Danujo.  
 630. In. J. R. G. Isbrücker, Den Haag, Nederl.  
 631. J. Friedrich, Kosice, Ĉeĥoslovakujo.  
 632. S. Szeemann, Kosice, Ĉeĥoslovakujo.  
 633. P. Maillard-Salin, Besançon, Francujo.  
 634. S-ino H. Maillard-Salin, Besançon, Franc.  
 635. F-ino F. H. Hanbury, Hornchurch, Anglujo.  
 636. S-ino M. Haudebine, Paris, Francujo.  
 637. W. S. Chalmers, Glasgow, Skotlando.  
 638. S-ino J. Chalmers, Glasgow, Skotlando.  
 639. F-ino T. Cochrane, Dunfermline, Skotl.  
 640. F-ino N. C. Giles, Southport, Anglujo.  
 641. F-ino A. Holt, Rossendale, Anglujo.  
 642. F. W. W. Simmons, Purley, Anglujo.  
 643. T. P. Fargher, Douglas, Anglujo.  
 644. F. Winzer, Bristol, Anglujo.  
 645. S-ino W. Winzer, Bristol, Anglujo.  
 646. H. Atkinson, Dorchester, Anglujo.  
 647. E. Flint, London, Anglujo.  
 648. J. B. Low, Hitchin, Anglujo.  
 649. F-ino R. J. Rees, Seven Sisters, Kimrujo.  
 650. F-ino E. Rees, Seven Sisters, Kimrujo.  
 651. E. J. Watson, Stanmore, Anglujo.  
 652. L. Wineman, London, Anglujo.  
 653. M. Jacobs, London, Anglujo.  
 654. C. F. King, London, Anglujo.  
 655. F. W. Perrin, London, Anglujo.  
 656. S-ino N. Perrin, London, Anglujo.  
 657. A. C. Perrin, London, Anglujo.  
 658. S-ino Perrin, London, Anglujo.  
 659. I. Roth, London, Anglujo.  
 660. M. A. Arger, Paris, Francujo.  
 661. F-ino J. B. Seckel, Almelo, Nederlando.  
 662. F-ino R. M. Spencer, Halifax, Anglujo.  
 663. S-ino R. Dommerholt, Deventer, Nederl.  
 664. F-ino T. Putto, Arnhem, Nederlando.  
 665. S-ino C. C. Oldham, Timperley, Anglujo.  
 666. S-ino C. A. Lawton, Hyde, Anglujo.  
 667. R. Kenworthy, Blackpool, Anglujo.  
 668. S-ino C. Kenworthy, Blackpool, Anglujo.  
 669. A. E. Boyer, Cannes, Francujo.  
 670. T. Collier, Cambridge, Anglujo.  
 671. S-ino T. Collier, Cambridge, Anglujo.  
 672. F. S. Leigh-Borwne, Gerrards Cross, Angl.  
 673. G. Luscombe, Bradford, Anglujo.  
 674. C. G. Chinn, Welwyn Garden City, Angl.  
 675. S-ino L. A. Chinn, Welwyn Garden City, Anglujo.  
 676. J. W. Chambers, London, Anglujo.  
 677. J. C. Chadwick, Rochdale, Anglujo.  
 678. S. H. Wighton, Dundee, Skotlando.  
 679. F-ino J. D. Bald, Edinurgh, Skotlando.  
 680. F-ino A. D. Bald, Edinurgh, Skotlando.  
 681. W. G. Phipps, Cheltenham, Anglujo.  
 682. G. L. G. Messer, Oxford, Anglujo.  
 683. A. Harrison, Oxford, Anglujo.  
 684. A. Clavenna, Genova, Italujo.  
 685. W. Bow, Portsmouth, Anglujo.  
 686. G. ten Doesschate, Kingston, Anglujo.  
 687. R. F. Jervis, Slough, Anglujo.  
 688. J. T. Harrod, Olton, Anglujo.  
 690. Pastrino G. Mewhort, Boston, Anglujo.  
 691. F-ino M. Matthews, Crewe, Anglujo.  
 692. F-ino E. Broster, Crewe, Anglujo.  
 693. J. F. Yeomans, Barrow-in-Furness, Angl.  
 694. S-ino E. Yeomans, Barrow-in-Furness, A.  
 695. F-ino A. Bower, Sheffield, Anglujo.  
 696. F-ino N. R. Sheppard, Birmingham, Angl.  
 697. E. Lee, Crewe, Anglujo.  
 698. S-ino E. Lee, Crewe, Anglujo.  
 699. J. Alofs, Bruxelles, Belgujo.  
 700. S-ino S. Alofs, Bruxelles, Belgujo.  
 701. A. Alofs, Bruxelles, Belgujo.  
 702. D. R. Tullio, Edinburgh, Skotlando.  
 703. F-ino M. Brown, Edinburgh, Skotlando.  
 704. F-ino J. J. Tetterode, Den Haag, Nederl.  
 705. F-ino M. L. Bottin, Bruxelles, Belgujo.  
 706. F-ino M. Saxl, London, Anglujo.  
 707. S-ino D. Kempeneers, Uccle, Belgujo.  
 708. F. M. Swinne, Bruxelles, Belgujo.  
 709. C. H. Bramkamp, Scheveningen, Nederl.  
 710. S-ino J. G. Bramkamp, Scheveningen, Ned.  
 711. F-ino J. G. Bramkamp, Scheveningen, N.  
 712. B. McGrath, Manchester, Anglujo.  
 713. S-ino W. Bidmead, London, Anglujo.  
 714. S-ino J. M. Hutchison, Edinburgh, Skotl.  
 715. H. R. Faul, West Hartlepool, Anglujo.  
 716. A. R. Fairbairn, Ryton-on-Tyne, Anglujo.  
 717. A. Carter, Leeds, Anglujo.  
 718. A. Brayshaw, Letchworth, Anglujo.  
 719. R. G. Lison, London, Anglujo.  
 720. R. A. M. Kearney, London, Anglujo.  
 721. C. Elliott, Croydon, Anglujo.  
 722. A. H. Middlemast, Manchester, Anglujo.  
 723. C. A. Barnes, London, Anglujo.  
 724. F-ino A. Eldridge, London, Anglujo.  
 725. G. H. Parker, London, Anglujo.  
 726. F-ino F. M. Smith, Ipswich, Anglujo.  
 727. Pastro Fr. M. Jackson, Lowestoft, Anglujo.  
 728. L. H. May, Weston-super-Mare, Anglujo.  
 729. W. S. Wigham, Eastbourne, Anglujo.  
 730. G. Bevan, Wrexham, Kimrujo.  
 731. S-ino A. Meek, Hastings, Anglujo.  
 732. H. H. Meek, Hastings, Anglujo.  
 733. W. Rae, Parkstone, Anglujo.  
 734. F-ino G. C. Smith, London, Anglujo.  
 735. E. J. Spence, London, Anglujo.  
 736. Pastro W. J. Downes, London, Anglujo.  
 737. F-ino A. Hamel, London, Anglujo.  
 738. S-ino A. G. Willsher, London, Anglujo.  
 739. F-ino G. Pillar, London, Anglujo.  
 740. W. T. Head, Weston-super-Mare, Angl.  
 741. S-ino E. Head, Weston-super-Mare, Angl.  
 742. J. W. Pratt, London, Anglujo.  
 743. Northamptonshire Esperantista Federacio, Anglujo.  
 744. Northamptonshire Esperantista Federacio, Anglujo.  
 745. H. W. Smith, Watford, Anglujo.  
 746. S-ino Smith, Watford, Anglujo.  
 747. F-ino A. G. Dougall, Glasgow, Skotlando.  
 748. A. Krolenbaum, Stanmore, Anglujo.  
 749. S-ro Clark, London, Anglujo.  
 750. S-ino K. Clark, London, Anglujo.  
 751. S-ino M. A. Butler, Kingston-on-Thames, Anglujo.  
 753. J. W. Butler, Kingston-on-Thames, Angl.  
 754. T. C. Butler, Kingston-on-Thames, Angl.  
 755. F-ino N. C. Bulet, Kingston-on-Thames, A.  
 756. F-ino J. Lepachelet, Somain, Francujo.  
 757. F-ino E. Reid, Edinburgh, Skotlando.  
 758. F-ino M. O. Langrick, Leeds, Anglujo.  
 759. F-ino O. Blewett, Leeds, Anglujo.  
 760. A. Thompson, Pudsey, Anglujo.  
 761. F-ino C. Guglielminetti, Torino, Italujo.  
 762. S-ino M. Paliková, Krnov, Ĉeĥoslovakujo.  
 763. K. Paliková, Krnov, Ĉeĥoslovakujo.  
 764. S. D. Brook, Scarborough, Anglujo.  
 765. F-ino A. Hellinx, Hilversum, Nederlando.  
 766. S-ino R. Van Veen, Hilversum, Nederl.  
 767. S-ino E. Schwartz, Jägerndorf, Ĉeĥosl.  
 768. F-ino A. A. Dik, Zeist, Nederlando.  
 769. A. A. Angus, Crewe, Anglujo.  
 770. R. G. Dupuis, Haarlem, Nederlando.  
 771. W. J. Edmonds, Newport, Anglujo.  
 772. S-ino D. M. Edmonds, Newport, Anglujo.  
 773. F. Goodliffe, Nottingham, Anglujo.  
 774. R. J. Cook, West Wickham, Anglujo.  
 775. T. Walker, London, Anglujo.  
 776. H. J. Harris, London, Anglujo.  
 777. S-ino E. M. Harris, London, Anglujo.  
 778. F-ino I. M. Wilks, London, Anglujo.  
 779. F-ino M. C. Stroud, London, Anglujo.  
 780. A. E. Philip, London, Anglujo.  
 781. S-ino B. M. Philip, London, Anglujo.  
 782. D. Church, London, Anglujo.  
 783. F-ino R. Bowthorp, London, Anglujo.  
 784. S-ino R. L. Burgess, East Barnet, Anglujo.  
 785. L. A. Clare, London, Anglujo.  
 786. S-ino D. Clare, London, Anglujo.  
 787. F. W. Hunt, London, Anglujo.  
 788. F. T. Saunders, London, Anglujo.  
 789. S-ino E. A. Saunders, London, Anglujo.  
 790. S-ino L. Hinkley, London, Anglujo.  
 791. F-ino M. Hinkley, London, Anglujo.  
 792. E. Jacques, La Louvière, Belgujo.  
 793. Edgard Jacques, La Louvière, Belgujo.  
 794. F-ino K. M. Foster, Doncaster, Anglujo.  
 795. Pastro W. B. Harrison, Stockport, Anglujo.  
 796. H. Dodson, Willaston, Anglujo.  
 797. G. A. Connor, New York, Usono.  
 798. F-ino F. Connor, New York, Usono.  
 799. F-ino D. E. Tappan, New York, Usono.  
 800. F-ino L. Ruhmayr, Wien, Aŭstrujo.  
 801. S-ino K. Wilhelmsen, København, Danlando.  
 802. F-ino S. S. Hartog, Borculo, Nederlando.  
 803. F-ino A. Drent, Leeuwarden, Nederlando.  
 804. S-ino C. M. Balcombe, Chard, Anglujo.  
 805. H. L. P. Polge, Besançon, Francujo.  
 806. A. Persson, Besançon, Francujo.  
 807. M. George, Besançon, Francujo.  
 808. S-ino George, Besançon, Francujo.  
 809. S-ro George, Besançon, Francujo.  
 810. F-ino M. Tait, Edinburgh, Skotlando.  
 811. F-ino H. Tait, Edinburgh, Skotlando.  
 812. S-ino Y. Labatut, Paris, Francujo.  
 813. F-ino H. Preste, Domont, Francujo.  
 814. A. Remond, Paris, Francujo.  
 815. S-ino Remond, Paris, Francujo.  
 816. F-ino M. T. Tinel, Les Andelys, Francujo.  
 817. F-ino M. Rameau, Limoges, Francujo.  
 818. S-ino M. Rineta, Courbevoie, Francujo.  
 819. B. Gahler, Gablonz a.N., Ĉeĥoslovakujo.  
 820. O. Hub, Maffersdorf, Ĉeĥoslovakujo.  
 821. F. Hub, Gablonz a.N., Ĉeĥoslovakujo.  
 822. P. E. Bidmead, London, Anglujo.  
 823. S-ino N. W. Bidmead, London, Anglujo.  
 824. F-ino E. Mason, London, Anglujo.  
 825. F-ino J. Wadham, Morden, Anglujo.  
 826. F-ino T. Amasanti, London, Anglujo.  
 827. T. M. Amasanti, London, Anglujo.  
 828. F-ino G. Weir, London, Anglujo.  
 829. F-ino J. Kennard, West Wickham, Angl.  
 830. F-ino E. A. Bailey, London, Anglujo.  
 831. A. Thoday, London, Anglujo.  
 832. S-ino F. E. Thoday, London, Anglujo.  
 833. F-ino M. F. Werry, London, Anglujo.  
 834. J. Hayden, London, Anglujo.  
 835. S-ino C. Hayden, London, Anglujo.  
 836. H. Boucon, Annecy, Francujo.  
 837. H. Herlemont, Paris, Francujo.  
 838. S-ino M. Jeangirard, Paris, Francujo.  
 839. R. Gérard, Châlons-sur-Marne, Francujo.  
 840. A. Mittey, Paris, Francujo.  
 841. S-ino S. Mittey, Paris, Francujo.  
 842. J. M. Mittey, Paris, Francujo.  
 843. C. Rousseau, Bécon-les-Bruyères, Francujo.  
 844. F-ino G. Faucher, Paris, Francujo.  
 845. L. Cozic, Vanves, Francujo.  
 846. S-ino T. Cozic, Vanves, Francujo.  
 847. J. Derks, Bruxelles, Belgujo.  
 848. S-ino P. Derks, Bruxelles, Belgujo.  
 849. W. Derks, Bruxelles, Belgujo.  
 850. F-ino D. Derks, Bruxelles, Belgujo.

**Laŭlanda Statistiko de la Aligintoj:**

Anglujo, 547; Aŭstrujo, 3; Belgujo, 28; Brazilo, 3; Ĉeĥoslovakujo, 12; Danujo, 5; Egiptujo, 3; Finnlando, 3; Francujo, 72; Germanujo, 4; Hispanujo, 2; Hungarujo, 1; Irlando, 2; Italujo, 6; Jugoslavujo, 1; Kanado, 1; Kimrujo, 7; Nederlando, 39; Norvegujo, 11; Polujo, 7; Rumanujo, 1; Skotlando, 42; Svedujo, 14; Svislando, 4; Usono, 7. Entute 825 el 25 landoj.

**Kongresbarometra stato : jam pli ol 900**

**Se vi ankoraŭ mankas, ne hezitu tuj anonci vin ! Nia Trideka promesas fariĝi impona manifestacio pri la vivanteco de nia afero !**

# Otto de Habsburg pri Esperanto

S-ro kort. kons. Steiner, Wien, sendis al Otto de Habsburg-Aŭstrio, la unua filo de la mortinta imperiestro Karl I de Aŭstrio, lernolibron, vortareton kaj broŝurojn pri Esperanto. Post tio li ricevis la jenan respondon (traduko el germana lingvo):

Tre estimata sinjoro kortega konsilanto Steiner!

Lia majesto la imperiestro akceptis kun intereso la libretojn kaj broŝurojn pri Esperanto, senditajn de vi, kaj komisiis min, esprimi al vi pro tio la plej bonan dankon.

En tiu ĉi serioza tempo, kiam malamo kaj envio instigas la popolojn sin levi unu kontraŭ la alia, nenia rimedo devas esti pretervidata, kiu povas kunhelpi forigi ekzistantajn malamikecojn kaj malpacojn.

Estu Esperanto per pli bona ebleco de reciproka kompreniĝo inter la popoloj unu el tiuj rimedoj, kiuj estas destinitaj kunhelpi en la firmigo kaj la sekurigo de l' paco, kiun la mondo tiel urĝe bezonas, kaj por kiu nia dinastio ĉiam estis aganta.

En la plej alta komisio,  
Grafo Trauttmansdorff.



## Nia duobla idealo

En la pasintaj kvindek jaroj oni multe parolis kaj babilis pri la « interna ideo » de Esperanto. Kutime, tamen, oni havis — kaj ankoraŭ havas — pri ĝi tre nebulan imagon. Iuj, kvankam malmultaj, volis identigi ĝin kun la strebado al ĝenerala kaj universala intermiksaĵo de popoloj, raso, religioj ktp. en unu tutmonda kaj tuthomara « kaĉego ». Aliaj konfuzis, aŭ ankoraŭ konfuzas, ĝin kun politika pacifismo, aŭ kun difinita politika partio aŭ frakcio. Ree aliaj volus fari el la Esperanto-movado kvazaŭ novan religian sekton.

Ne mirigas, do, se multaj, kiuj ne ŝatas tiun neklaran kaj nedifinitan karakteron de la « interna ideo », prefere tute ne parolas pri ĝi. Sed la tuta forneo de la « interna ideo » senigus nian aferon kaj nian movadon de ilia enhavo la plej ĉarma, de ilia parto la plej ideala.

Ni kredas, ke tiu kontraŭstaro de ne malgranda parto de l' esperantistaro — jam dum la vivtempoj de la majstro — kontraŭ la « interna ideo » estas naskita nur el miskompreno. Ni kredas, ke, se oni senigus la « internan ideon » de ĝia troa mistikismo, kaj se oni unu fojon por ĉiam donus al ĝi klaran difinon, la kon-

traŭstaro kontraŭ ĝi malaperus ne nur en niaj propraj rondoj sed eĉ ĉe ekstere-starantoj.

Kio do estas la celo de Esperanto kaj de l' Esperantismo? Ĉi estas: *alporti al la mondo la interkomprenon*. Sed, jam celante la interkomprenon, ĉu oni kapablus limigi la celadon ekskluzive al la *buŝa* interkompreno? Ĉu ne prezentigas samtempe la multe pli ideala flanko de la afero: la ankaŭ *ĥora* interkompreno? Ni opinias tial, ke oni povas proksimume tiel formuli la difinon: *Esperanto kaj Esperantismo celas la buŝan kaj ĥoran interkompreniĝon inter homoj parolantaj diferencajn naciajn lingvojn*.

Ni ripetu, por ke oni vidu tute klare: *Esperanto*, kiel lingvo, kiel rimedo, estas la pli teknika, la pli praktika flanko de nia afero, la celado al *buŝa* interkompreno, kvankam ankaŭ ĉi tiu pli teknika flanko por si mem, kaj sen io plia, estas granda idealo, — *Esperantismo*, se oni volas identigi ĝin kun la « interna ideo », estas la pli ideala flanko de nia afero, la celado al *ĥora* interkompreno. Tiu ĉi duobla celado estas do *samtempe tre-ge praktika kaj treege ideala*. Kaj la

mondo fakte bezonas tiun *duoblan* idealon: la lingvan kaj la ĥoran interkompreniĝon.

Kompreneble, la ideo pri la *ĥora* interkompreniĝo tute ne estas ideo « *interna* », sed nepre « *ekstera* » de la ideo pri la *buŝa* interkompreniĝo, kvankam intime kunligita kun ĝi, — oni povas preskaŭ diri: ĝi estas ĝia natura kompletigo.

Manon sur koron! Ĉu iu el vi, ĝesamideanoj tra la mondo, per via laboro por Esperanto celas *nur la buŝan interkompreniĝon* de la homaro — certe estos ne multaj inter vi; aŭ ĉu eĉ ne tio vin interesas, sed ĉu vin interesas *nur la lingvo* kiel tia: ĝia vortrezoro, ĝiaj gramatikaj reguloj, ĝia prononco? Ni ne kredas. Ĉu ne pli vere la ideo, ke pere de la lingvo komuna vi akcelos ankaŭ la *ĥoran* interkomprenon, estas ankaŭ por vi la ĉefa instigo de via laboro por nia afero? Kvankam ja ankaŭ la pure *teknika* flanko de la afero (la lingvo kaj ĝia tutmonda apliko) kapablas entuziasmi, proksimume samskale, kiel tion kapablas la konstruo de nova maŝino, aŭ alia teknika aŭ kemia invento.

Konfesu, la granda plimulto el vi, kiuj ĝis nun rifuzis la « internan ideon »: via malemo al « *idea Esperantismo* » estis kaŭzita nur de la stranga mistikismo, aŭ de la erara interpretado, kiun oni ofte donis al tiu « *interna ideo de l' Esperantismo* »!

Ni jam senigu la belan « internan ideon » de ĝia troa mistikismo, de ĝiaj eraraj difinoj, ni elŝeligu ĝin el la amaso da strangaj aŭ malpli strangaj -ismoj, kiuj estas por ĝi nenecesa balasto, kaj ni klare kaj nedubinde eldiru kio ĝi estas: *la ideo pri la ĥora interkompreniĝo de la homoj kaj nacioj*, la ĥora interkompreniĝo krom la *buŝa*, — tiam ankaŭ ili, kiuj ĝis nun rifuzis tiun ideon, aŭ nur hezite kuraĝis konfesi sin al ĝi, akceptos ĝin kun plezuro, kaj des pli entuziasme laboros de nun por *nia duobla idealo: la buŝa kaj la ĥora*.  
T.J.

### La kontraŭuloj asertas

ke Esperanton oni povas uzi, kaj efektive uzas, ankaŭ por malnoblaj celoj. — Jes, certe oni povas uzi Esperanton por malnoblaj celoj, same kiel oni povas misuzi — kaj tre ofte tion faras — iun ajn nacian lingvon, kaj same kiel oni povas bonuzi kaj misuzi kiun ajn rimedon: telefonon, telegrafon, radion, kinon, monon, dinamiton... Ĉiu-kaze Esperanto estas kreita por la plej noblaj celoj imageblaj, ĝi estas destinita por *servi* al la homaro. Se okaze ĝi estas misuzata, la malutilo kaŭzata de la misuzo tamen ne povas elteni komparon kun la grandega utilo, kiun ĝi efikas, — kun la grandioza progreso, kiun ĝi alportis, kaj alportos, al la tuta homa gento.

# PROPAGANDO

## Propaganda prelego farita dum la Jubilea Kongreso en Varsovio de E. Malmgren

(Daŭrigo.)

### 11. LA GAZETARA SERVO.

Kiam temis pri turismo, mi aludis la utilon, kiun oni povas havi de kunlaboro kun la lokaj gazetoj. Jes, samideanoj, ankaŭ el aliaj vidpunktoj la kunlaboro kun la gazetoj estas grava. Ĉar ĝuste la gazetoj povas liveri plej konstantan kaj efikan propagandon inter la ĝenerala publiko.

Ĉu la esperantistoj do nun eluzas la propagandoblecon pere de la gazetaro? Mi opinias ke ne, ĉar verdire ĝis nun mankas sistema agado en tiu laborkampo.

Estimataj samideanoj, per tio mi volas diri, ke mi opinias la hazardajn Esperanto-artikolojn en diversaj gazetoj nesufiĉaj. Por veni al pozitiva rezulto, oni nepre devas racie organizi la gazetservon.

Mi do nun volas antaŭ vi — kaj mi speciale turnas min al la estraroj de la landaj asocioj — prezenti projekton de internacie aplikebla gazetservo. Mi antaŭvidas, ke ĉiu estraro ne prokrastos tiun ĉi problemon, sed traktos ĝin kaj poste donos detalajn ordonojn al siaj aliĝintaj kluboj.

Ĉar la laboro por distribui Esperanto-novaĵojn devas esti tre serioze pri-traktata, mi konsilas, ke oni en ĉiu lando elektu specialan Gazetaran Komisionon, kiu konsistu el 1-5 membroj. Tiu Gazetara Komisiono havos la taskon memstare organizi la gazetservon en la tuta lando. La Komisiono devas prizorgi, ke en ĉiuj lokoj, kie troviĝas esperantistoj, estu lokaj reprezentantoj («Novaĵperantoj»). La Gazetara Komisiono ankaŭ havos la taskon kolekti (el Heroldo kaj aliaj fontoj) Esperanto-novaĵojn kaj ĉiumonate almenaŭ unufoje dissendi la kolektitan materialon (en la gepatra lingvo!) al la Novaĵperantoj. Mi speciale atentigas pri tio, ke ne sufiĉas unufoja dissendo de tiuj novaĵoj. Ili devas esti dissendataj dum la tuta jaro same akurate kiel iras bona horloĝo! Ni esperantistoj ja nun konsciis pri tio, ke ni de nun agos ne kiel senhelpaj, kapricaj amatoroj sed kiel deĵorantaj oficistoj kaj ĉefoj. Ĉu ne? Jes, ni devas esti kiel armeo kun soldatoj kaj oficiroj. De ĉies volo kaj emo plenumi siajn taskojn dependas la sukceso. Se vi dizertas el la armeo for de viaj devoj, peros la armeo kaj pereos nia movado.

Kion mi nun diras pri la devoj de la Gazetara Komisiono, validas ankaŭ por la Novaĵperantoj. Ĉar ili ja en sia

loko estas la reprezentantoj de la tuta internacia Esperanto-movado. La Novaĵperantoj sentu kaj komprenu la gravecon de sia laboro, de sia lerteco, de sia persistemo!

Sed la Gazetara Komisiono kolektu ne nur eksterlandajn novaĵojn por distribuado en la hejmlando, la Komisiono ankaŭ kolektu kaj sendu ĉiujn kaj ĉiajn interesajn enlandajn Esperanto-novaĵojn ekz. al « Heroldo de Esperanto ». Ankoraŭ verŝajne estas tro frue krei specialan internacian gazetservon, kiu prizorgos la multobligadon kaj internacian distribuadon de novaĵoj. Certe « Heroldo de Esperanto » bonvolos daŭrigi sian specialan kolonon por la gazetara servo!

Ni imagu, ke iu landa Gazetara Komisiono dissendis al la Novaĵperantoj sian monatan cirkuleron. Kion devas fari la Novaĵperanto? Nu, li transdonos la materialon al la loka(j) gazeto(j). Sed li ne donu tuj la tutan materialon. Li prezentu nur unu aŭ du artikolojn, kaj por la venonta semajno li liveru aliajn artikolojn. Antaŭ ĉio li provu aranĝi tiel, ke en la loka(j)

gazeto(j) aperu ĉiusemajne io pri Esperanto. La ĝenerala publiko nepre ĉiusemajne devas ion aŭdi kaj vidi pri nia lingvo. Kaj vi devas ĉiam teni en via memoro, ke mallonga gazetartikolo estas konsiderata (de reklamspertuloj) same efika kiel tutpaĝa anonco! Ĉar ni ne havas monon por propagandi per grandaj anoncoj, ni devas eluzi la alian reklammanieron. Ĉiu vera esperantisto komprenas la gravecon de la proponita gazetara servo. Ĉu estas iu inter vi, kiu ne volonte kunlaboros? Vi certe ĉiuj estas pretaj. Sed memoru, ke vi devos longe kaj persiste labori! Kaj se vi transprenis tiun laboron, vi konsideru ĝin ne libervola farotaĵo sed profesia devo. Bonvolu ankaŭ teni en via memoro, ke la laboro, kiun vi momente devas fari en tiu kaj alia Esperanto-kampo, ankoraŭ ne donas monan rekompencan. Sed ju pli frue ni povos seriozigi la intereson de la gazetoj kaj de la ĝenerala publiko pri Esperanto, des pli certe vi kaj aliaj samideanoj povos ricevi salajron aŭ honorarion por sia laboro. Kiam vi do nun laboras — senpage —, vi laboras por via estonta bonfarto. Do serioze kaj fidele laboru!

Por ke fariĝu bona kontakto inter la Gazetara Komisiono kaj la Novaĵperantoj, oni devas krei iun raportsistemon. Mi do konsilas, ke la Komisiono pretigu la jenajn raportblankedojn:

<b>Raporto pri la gazetservo</b>		
En . . . . .	(loko)	. . . . .
dum la . . . . .	kvaronjaro 193....	(La raporto estas sendota tuj post la fino de ĉiu kvaronjaro al Gazetara Komisiono, adreso: . . . . .)
Novaĵperanto:	. . . . .	. . . . .
Plena adreso:	. . . . .	. . . . .
La jenaj artikoloj aperis:		
	Dato	Nomo de gazeto
	Nomo de artikolo	Kiom da linioj?
	Rimarkoj	
Specialaj rimarkoj, proponoj kaj informoj:	. . . . .	. . . . .
. . . . .	(loko) la . . . . .	193....
	(Nomo)	

La Novaĵperanto memkompreneble ankaŭ devas tuj sendi informojn al la Gazetara Komisiono, se io raportinda okazis en lia loko!

Kelkaj landaj asocioj jam konten-

tige organizis la gazetaran servon. Mi speciale volas citi la jenajn landojn: Argentino, Ĉeĥoslovakujo, Francujo, Japanujo, Norvegujo, kaj Svedujo. Aliaj landoj nun kuraĝe sekvu la ekzemplon! (Daŭrigota)

# Unueco estas Forto

## Ĉu „skismo” ?

Post kiam, antaŭ iom pli ol unu jaro, la neŭtrala Esperanto-movado fine kreis al si, per la Internacia Esperanto-Ligo, pli malpli tiun organizon, kiun ĝi dum jardekoj aspiradis, ĉi tiu organizo (IEL) efektive sukcesis rekolekti ĉirkaŭ si la plimulton de la organizita neŭtrala esperantistaro. Ĝi kalkulas hodiaŭ ĉ. 13500 membrojn, inter ili ĉ. 3000 individuajn. La nuntempa UEA, formita de tiu parto de neŭtralaj esperantistoj, kiuj ne volis alkonformiĝi al la decido de la plimulto, laŭ sia propra informo kalkulas 1300 membrojn, tio estas akurate unu dekono de la membroj de IEL.

Laŭ sia strukturo, IEL estas ligo de *asociaj kaj individuaj membroj* — do en ĝi la ordinara esperantisto trovas ĉion, kion li bezonas por sia esperantista okupo: instigon por *entuziasmiĝi* pri la ideo, materialon por *varbi kaj propagandi*, rimedojn por *studi kaj perfektigi*, kaj ankaŭ vastan eblecon por *praktiki kaj apliki la lingvon internacie*; kontraŭe, la nuna UEA estas aplika unuiĝo de individuaj membroj, ĝia strukturo do estas sufiĉe malsimila de tiu de IEL.

Estas, sekve, jam senutile, eĉ malutile, paroli pri « skismo » en la neŭtrala Esperantomovado. Ne estas vera skismo. Malkontentuloj ekzistas ĉiam, kaj ili ĉiam havos la eblecon, formi ĉu opozicion interne de la unueca organizo — opozicion kelkfoje akcelantan sed plej ofte obstrukcanta — ĉu apartiĝi en nova organizo. Eble, dum iuj cirkonstancoj, aparta organizo estas eĉ preferinda, ĉar tiukaze la plimulto povas des pli trankvile entrepreni la verajn kaj vere grandajn taskojn de esperantista organizo, kiuj konsistas ne en reciprokaj kvereladoj kaj polemikadoj, sed en *serioza insista kaj persista laborado por la ĝenerala enkonduko de la ideo de lingvo internacia* sub la konkreta formo de Esperanto. La granda celo de la Esperanto-movado ja estas, *konkeri la mondon, la homaron kaj la jarmilojn!* Kaj tiun celon ĝi ne atingos per konstanta interna interfrotado, sed nur, se ĝi kolektas ĉiujn volemajn fortojn en unu forta bloko, per kiu ĝi kapablos efike kontraŭstari mokojn kaj atakojn, kaj mem porti la atakon kaj venkon en la vicajn de la kontraŭuloj, kaj antaŭenmarŝi, ĝis kiam la triumfo estos atingita.

Krome oni povas diri ke la neŭtrala esperantistaro, tiom kiom ĝi entute deziras partopreni la internacian organizon, kaj tiom kiom ĝi kapablas subordiĝi apartajn interesojn al tiuj de la tuto, hodiaŭ estas organizita en Internacia

## Letero al nederlanda sinjorino

Kara samideanino,

Koran dankon pro via letero, kaj mi tre ĝojas aŭdi ke vi intencas veni al Londono proksiman jaron por la Universala Kongreso.

Mi konstatas ke eĉ nun vi ekscitiĝas pri la okazo viziti nian urbegon, kaj mi povas certigi al vi ke vi ne estos malkontenta. Vi petas respondojn al multaj demandoj pri Londono, kaj, kvankam, kiel multaj Londonanoj, mi ne scias tiel multe kiel mi devus pri nia ĉefurbo, mi plezure faros mian eblon doni al vi mallongan skizon.

Unue, eble estos malfacile por vi kompreni la grandecon de Londono. Fakte, ĝi estas Provinco kun la plej multe okupata kaj plej malnova parto en la mezo. Ĉi tiun centron ni nomas la « City » (civito). Ĉe la eksteraj randoj pli kaj pli kreskadaj kaj etendiĝas la eksterurboj, en kiuj loĝas la gelaboristoj de Londono (kaj aliaj). Tie oni povas vidi milojn da dometoj, ofte konstruitaj pli impresive ol substance. Ĝrile koloritaj reklamoj kun allogaj bildoj de la domoj invitas la homojn eniri kaj esplori la belaspektajn loĝejojn, kiuj ankoraŭ estas nevenditaj. Efektive, ĉiu el la pli riĉaj laboristoj volas posedi sian propran domon, kun ĝia peco de tero, en kiu li povas fari ĝardenon. Se vi starus ĉe bona vidpunkto en eksterurbo dimanĉmatene iam dum la somero, vi povus vidi ĉiujn loĝantojn forte laborantaj en siaj ĝardenetoj. Tiuj, kiuj estas malnovaj enloĝantoj, rigardas fiere la rezulton de sia laboro. La novvenantoj nur fosas kaj fosas, ŝajne kun la intenco fari panorameton da montetoj kaj valoj!

Nun ni rigardu ĉi tiujn homojn dum la semajno. Imagu ke ni estas ĉe unu el la multaj grandaj stacidomoj, kiuj estas sur la rando de Londono, kaj estas frumatene. Proksimume de la oka ĝis la deka gelaboristoj alvenas amase al la laborejoj en la centro de Londono. Ili estas plejparte gejunulaj stenografistoj kaj oficistoj. Aliaj aspektas mezaĝaj kaj dignoplenaj — sendube ili havas bonajn oficojn en la « Civito ». Ĉi tiuj sidas en la unuaklasaj vagonoj kaj kutime fumas cigarojn aŭ pipojn kaj legas ekskluzivajn ĵurnalojn per rimarkinda maniero. Mi intencas diri per la vorto « rimarkinda » ke iliaj brakoj, kruroj kaj ĵurnalo estas larĝe etenditaj, kaj de tempo al tempo fumpufoj suprenfloras super la ĵurnalo.

Nu, se vi estus pacienca, vi povus stari tie en la stacidomo dum du horoj, kaj vi eble demandus: « Ĉu estas eble ke aliaj alvenos? ». Ŝajne, miloj jam eljetiĝis de la vagonaroj, kaj ni povas vidi ke ili rapidas laŭ la stratoj kaj malaperas en la diversajn oficejajn konstruaĵojn. Tamen, aliaj ankoraŭ devas fari mallongan veturon antaŭ la atingo de la laboro, kaj ili kuras aŭ al la omnibusoj aŭ al la subteraj stacidomoj.

Nun la ĉiutaga laboro ja komencas, sed eĉ dum la mateno la mallarĝaj stratoj havas multajn marŝantojn kaj la trafiko estas densa. Tiam

venas la lunĉoro — kutime inter la 13-a kaj la 14-a — kaj miloj da homoj deziras manĝaĵon tuj kaj samtempe. Ĉiu rapidas al la restoracioj por trovi spacon kaj dum unu horo ĉiu manĝejo estas plenplena. Estas kutimo de la Londonano plendi pri la restoracio kiun li vizitas — aŭ la manĝaĵo estas malbona, aŭ la servado estas malrapida — kaj ofte, kompreneble, la plendoj ne estas senbazaj.

La plejmulto de la restoracioj estas kiel ni nomas ilin « teashops » (te-trinkejoj), sed ĉi tie oni povas havigi preskaŭ ĉion ajn krom teon. Ĉi tiuj restoracioj estas tre popularaj; ĉar, kiel ĉiu scias, la angloj ŝatas sian nacian trinkaĵon, kaj la manĝaĵoj ne estas tro multtekostaj. Estas aliaj manĝejoj kiuj estas kutime pli malgrandaj kaj pli multtekostaj. Ili servas lunĉojn precipe, kaj la manĝaĵo ofte estas tre bona. Ankaŭ estas multaj trinkejoj kiuj servas bonan manĝaĵon, sed oni devas ankaŭ trinki alkoholaĵon. Kompreneble, ĉi tiuj lokoj estas ĉeestataj precipe de viroj.

Dum la posttagmezo estas pli kviete denove en la « Civito » ĝis ĉirkaŭ la 17-a horo, kiam multaj forlasas la laboron kaj hejmeniras. Denove pleniĝas la diversaj veturiloj. Kiel mi jam menciis, la vagonaroj portas multajn homojn — proksimen kaj malproksimen (ofte la laboristo havas unu- aŭ duhoran hejmenveturon), sed ankaŭ gravaj estas la omnibusoj kaj tramoj, kaj dum la Londonaj laboristoj hejmeniras, mi diros kelkajn vortojn pri ili.

La omnibusoj estas la « popolaj aŭtomobiloj », kiuj estas grandaj kaj luksaj ses-radaj veturiloj kaj multe uzataj. Ili ankaŭ estas multnombraj kaj veturas al ĉiuj partoj de Londono. La veturigistoj estas famaj pro sia kompetenteco (malofte akcidento okazas) kaj la konduktistoj estas ĉiam bonhumoraj kaj helpemaj viroj.

La tramoj estas malpli ŝatataj kaj estas tre bruemaj, sed ili havas ian superecon pro la fakto ke ili entenas pli da pasaĝeroj. Nuntempe en kelkaj partoj de Londono oni anstataŭigas la tramojn per nova veturilo kiun ni nomas « trolleybus ». Efektive, ili estas elektraj omnibusoj, sed pli grandaj kaj kompreneble preskaŭ silentaj.

Ĉi tiuj tri veturiloj estas por la ĝenerala uzo, sed por la pli riĉaj civitanoj estas ankaŭ la « taxis » (fiakroj), kiuj estas famaj pro sia malmoderna formo. Parizano priridus ilin, pensante pri la modernaspektaj aŭtomobiloj de Parizo. Tamen, nun estas diro en Londono ke tre baldaŭ aperos modernaj aŭtomobiloj ankaŭ ĉi tie. Kiam la malnova veturilo estos for, Londono perdos unu el siaj famaj antikvaĵoj.

Nu, mi ekvidas ke mi jam skribis longan leteron al vi, kvankam mi ankoraŭ havas multon por diri al vi. Do, mi kredas ke estas pli bone ke mi daŭrigu ĉi tiun skizon en alia letero pli malfrue, alie mi nun skribus senfine!

Esperante ke vi bonsanas, salutas vin

Via, sincere —

« Londona Laboristino ».

Esperanto-Ligo aŭ volas aliĝi al ĝi en proksima estonteco. IEL do estas nun jam la internacia organizo de la neŭtrala esperantistaro. *Skismo ne ekzistas*. Kiu hodiaŭ ankoraŭ parolas pri skismo, tiu nenecese enportas maltrankvilon en la proprajn vicajn. Kaj tion ni evitu. Prefere laboru senhalte por fortigi nian internacian ligon ĉiuj kiuj konsentas kun la devizo de IEL ke

**UNUECO ESTAS FORTO !**

### La kontraŭuloj asertas

**ke Esperanto neniam utilas, kiam oni venas en malgrandan vilaĝon, kie ne troviĝas esperantisto. Fakte! Sed kiom utilas la angla, franca, germana, hispana kaj itala lingvoj kune, kiam oni venas en ĉeĥan, danan aŭ botokudan vilaĝon? Kiom utilas en kiu ajn vilaĝo la fervojo, se ĝi preteriras ĝin je kvindek kilometroj? Ĉu iu prudenta homotial rezignos uzi la fervojn entute?**



# Anglemluloj

Dum kelka tempo mi vojaĝis en Skandinavio, kiel prelegisto. Ofte okazis ke mi renkontis tiajn homojn, kiajn priskribas la nomo « anglemluloj ». Ili estas studentaj la anglan lingvon, ofte dum multaj jaroj, kaj kelkfoje ili parolas ĝin bone, tiel ke anglo povas kompreni preskaŭ ĉiun frazon. Sed « anglemluloj » ĉiam havas la trajton ke ili ĵaluzas zorgas, flegas kaj nutras sian angla-lingvan kapablon tiel, kiel juna patrino sian unuan infanon. Kiel ili ĝojas, kiam ili renkontas sendefendan anglon! Kiel ili fieras, kiam ili havas la okazon montri sian fluecon! Kaj kiel ili tedas la kompatindan aŭskultanton, kiu devas aŭdi la poemon parkere lernitan, kaj la kanton « It's a long way tot Tipperary ».

Sed mi estas pacienca homo; mi esperas ke mi neniam malhelpos la studenton de iu ajn lingvo. Mi nur plendas kontraŭ tiuj homoj, kiuj atakas Esperanton, kvazaŭ pensante ke ĝi konfliktas kun la angla lingvo. Jen estas tipa parolado kun « anglemlulo »:

**Anglemlulo:** Kial vi okupas vin pri tiu lingvo? Angla lingvo ja estas jam mondlingvo!

**Anglo:** Unue, ĉar angla lingvo ne sufiĉas. Due, ĉar mi havas kaj intereson por, kaj utilon de, Esperanto. Cetere, laŭ tiu argumento angloj devus ne studi iun ajn lingvon. Ĉu vi malaprobas ke mi ankaŭ studas germanan lingvon, kaj estas studinta, ĝis nun senutile, la francan lingvon dum kvar jaroj en lernejo?

**Anglemlulo** (lasanta la unuan argumenton): La franca kaj la germana estas vivantaj lingvoj, ne tiaj, kia estas tiu Esperanto.

**Anglo:** Ĉu Esperanto estas senviva?  
**Anglemlulo** (kun forta konvinko, klare ne ŝanĝebla): ABSOLUTE SENVIVA!

Ĉi tiu afero prezentas interesan psikologian problemon. Kial la anglemluloj sentas tiom akran malŝaton kontraŭ Esperanto? Ĉu ili vere kredas ke la lingvo estas stultaĵo, neuzebla kaj nepratika? Mi ne kredas ke tiu klarigo aŭ iu ajn logika kaŭzo povas elvoki tian malŝaton, tian kontraŭsenton. Ne! Mi kredas kontraŭe ke ili tuj konstata, kvankam ne tute konscie, ke Esperanto estas vere bona ideo, praktika kaj logika. Sed ili sentas rivalcon. Ili sentas ke ilia lingva infano, kiun ili tiel fiere prizorgis dum multaj jaroj, perdos sian gloron, se aperas bonsana rivalo. Ili sentas lojalecon. Ne nur tion; sed ankaŭ ili sentas ke ili mem, la fieraj patrinoj, perdus sian

# Esperanto : angla = 1108 : 842

Esperanto superas la anglan lingvon en granda internacia konkurso.

Antaŭ kelkaj monatoj oni povis legi en la Esperanta gazetaro pri grava konkurso aranĝata de la « New History Society » en New York, Usono. En tiu konkurso — en kiu la premioj sumis pli ol 5,000 dolarojn — oni devis verki tezon pri la atingo de universala malarmado, kaj devis respondi kelkajn demandojn, unu el kiuj estis:

*Ĉu vi aprobas la instruadon de internacia helplingvo en la lernejoj flanke de la nacia lingvo? Se jes, ĉu tio estu Esperanto aŭ iu el la naciaj lingvoj?*

Estas ĝuste la respondoj al tiu demando, kiuj havas gravan signifon por nia movado. Jen statistiko de tiuj respondoj:

	Numero de tezoj		Ne voĉdonis	
	Esperanto	Angla	Esperanto	Angla
Usono	526	205	167	154
Kanado	166	81	41	44
Cetera Am.	283	94	77	112
Eŭropo	1549	556	298	695
Azio	413	61	171	181
Afriko	157	56	60	41
Aŭstralio	79	36	20	23
Nov-Zelando	35	18	8	9
	<b>3208</b>	<b>1108</b>	<b>842</b>	<b>1258</b>

Tiuj ciferoj montras, ke, kvankam preskaŭ unu triono de la konkursantoj ne voĉdonis (efektive, en tiu kolono, proksimume cent voĉdonis por aliaj lingvoj; latina, germana, franca ktp.), Esperanto facile venkis per 1108 voĉoj, dum la angla lingvo ricevis nur 842.

Konstatante ke tiun ĉi konkurson

rajton fieri, se ĉiuj homoj, ĉiuj vulgaretoj, ankaŭ povus havi infanojn. Kaj tiel facile naskitajn infanojn, kiel Esperanto! Ne, tute ne! La anglemaj patrinoj (daŭrigante la metaforon), prefere ol kredi siajn naskodolorojn nenecesaj, atakas kaj insultas Esperanton.

Nu, ĉu ĉi tiu konflikto inter la angla kaj Esperanto vere ekzistas ekster la cerboj de la anglemluloj? Ŝajnas al mi ke ne. Plejparte, la utilo de angla lingvo kaj Esperanto troviĝas en tute malsamaj kampoj. La disvastiĝo de Esperanto ne povas nuligi la utilon de la angla lingvo, kaj certe ne la honoron merititan al la lerninto de ĝi. Mi kredas ke la disvastiĝo de nia lingvo helpos fari pli grandan intereson por lingvoj ĝenerale. Ĝi helpas al la lingvostudado kaj la internaciaj rilatoj; pro tio Esperanto-parolanta mondo eble pli studus lingvojn ol la nuna mondo (anglemluloj ĉiam estas intruistoj).

Sed — kiel utilas argumentoj? — anglemluloj, laŭ difino, estas ekster argumentoj. Fred. H. Turner.

aranĝis neŭtrala societo, kiu havas nenian rilaton kun la Esperanto-movado, oni devas konsenti ke la rezulto reprezentas iun el la plej trafaj sukcesoj, kiujn nia lingvo ĝuis lastatempe.

Bonvolu diskonigi tiun ĉi informon per viaj nacilingvaj gazetoj! E. W. A.

(Pliajn informojn volonte donos New History Society, 132, East 65th Street, New York Usono.)

## El la urbo de la 30-a Univ. Kongreso

Kvaronjara konferenco de Londona Esperantista Federacio

okazis la 15.1. Oni vigle diskutis multajn aferojn kaj preparolis specialajn aranĝojn rilate al la Universala Kongreso. Nova prezidanto: s-ro W. G. Keable. — Post la diskutado Cseh-instruistino f-ino M. Saxl mallonge parolis kaj precipe menciis, kiom agrable surprizis ŝin la fakto ke en la Londona Federacio ĉiuj grupoj (neŭtralaj, politikaj ktp.) kunlaboras harmonie. En neniu alia eŭropa lando ŝi vidis tian bonhumoran kunagadon.

La 17.1. f-ino Saxl gvidis provlecionon por inaŭguri la kursojn, kiujn ŝi prizorgos en Londono. La ĉambrego de la Londona Esp.-Klubo estis plenplena, kaj per sia mirinde lerta instruado f-ino Saxl kaptis ĉies koron. Kiom oni ridegis, kiam ŝi gratulis la lernantojn pro tio, ke ankaŭ en la angla lingvo ekzistas la Esperanto-vorto « jes »! Tuj pli ol 40 aliĝis al la unua kurso. (E.W.A.)

### Instruista kunveno en Londono

okazis la 8.1. en « University College », sub gvido de f-ino G. H. Moxon M.A. S-ro Butler preparolis siajn lastatempajn vizitojn al lernejoj tra la tuta lando kaj konstatis pligrandigon de la nombro de gelnantoj, kiuj studas Esperanton, kaj pliboniĝon de instruado. Sekvis raporto de kvin geinstruistoj, elektitaj pro la diverstipeco de iliaj lernejoj:

F-ino Edwards (altgrada lernejo) menciis progreson de lernantinoj per Esperanto post la forlaso de la lernejo. F-ino Walters (centra popol-lernejo) parolis pri la instruado de Esperanto anstataŭ la franca lingvo en kelkaj klasoj. S-ro Toms (elementa lernejo) substrekis la intereson inter 300 knaboj en 9 klasoj pro enkonduko de Cseh-metodo. F-ino Ball (kolegio por blinduloj) raportis pri siaj gelnantoj inter la aĝoj 13-35. F-ino Nixon (daŭriga taglernejo) aludis la daŭrigojn de la kursoj en duan jaron kaj postan gindandan viziton al Internacia Esp.-Domo en Arnhem.

Kun granda intereso oni aŭdis de f-ino Sawyer, kiel organiziĝis la Internacia Libertempo en Tinker's Farm Lernejo, laŭ permeso de la Edukada Komitato. Tre kontentiga estis sciigo ke « Juna Vivo » organizas similan aferon por aŭgusto.

Oni pritraktis interlernejan agadon, speciale korespondadon; la pretigon de taŭga legolibro; ankaŭ, kun laŭdo, la internaciajn kursojn por geinstruistoj en Arnhem kaj Helsingör. Fine oni aŭskultis bonegan kaj humorplenan paroladon de f-ino M. Saxl pri ŝiaj kursoj por infanoj kaj geinstruistoj en Danlando.

Inter la ĉeestantoj estis f-ino Margery Fry, Prof. N. B. Jopson (Universitato Cambridge) kaj s-ro Nowell Smith. (V.C.N.)

# La Esperanto-Literaturo kreskas

**Kensaku Simaki: Karcero**, 163 p. 12x19 cm. Prezo ne indikita. Eldonis Librejo Kaniya, Kio-to Japanujo. El la japana originalo tradukis Redakcio de « Tempo ».

La libro konsistas el kvar noveloj (Lepro, Suferado, Falo, Blindiĝo), kiuj per naturalismaj trajtoj prezentas travivaĵojn de politikaj mal-liberuloj en japanaj malliberejoj.

La malliberejo-problemo dum la lastaj jaroj tute ŝanĝis siajn aspektojn: unuflanke oni komprenis, ke krimulo, pro sia ago, ne sola estas kulpa, sed kunkulpas diversaj cirkonstancoj: liaj ekonomiaj kondiĉoj, lia eduko, la medio en kiu li vivis, kaj diversaj aliaj. Konsekvence, sub la novaj influoj de la kriminologio, oni klopodis, ke la puno ne estu « retorsia » sed nur celhava: eduko, alkutimigo al laboro ktp.

Ĉiu popolo, sendube, havas belajn kaj ĝojajn flankojn, apud malbelajn kaj malĝojajn. La mallibereja problemo certe estas unu el la plej malbelaj kaj hontigaj flankoj de ĉiu popolo.

Ĉiu homo, same ĉiu popolo, ne volonte malkaŝas siajn malbelajn flankojn. Tial la mallibereja vivo estas konata nur al specialistoj kaj fakuloj (krom la malliberuloj), — la popolo ne konas tiun problemon. Tiel estas en Eŭropo: la eŭropanoj ne konas siajn malliberejojn. Ĉu do estas necese diri, ke ni tute nenion scias pri la japanaj malliberejoj?

Jen, tiun flankon de la socia vivo malkaŝis por ni esperantistoj, niaj japanaj samideanoj. La libro « Karcero » estas trege interesa, ne nur por fakuloj, sed por ĉiu leganto, des pli, ke kelkloke la aŭtoro montras al ni la vivon de tiuj malliberuloj, en la libereco, antaŭe, kiam ili estis farintaj konsciencigan laboron inter la laboristoj. Tiamaniere la libro montras al ni ankaŭ tiujn tre interesajn trajtojn de la japana socia vivo.

Malgraŭ, ke en la libro troviĝas kelkaj frazoj, mi diru « laŭ japana kompreno », iom ne facilaj por eŭropano, tamen oni ĝin legas « per unu spiro ».

La libro estas bele eldonita, sur bona papero, la preso estas bona kaj klara. Ĝenas iom kelkaj preseraroj, kiujn oni povis eviti.

Mi rekomendas la libron kiel vere interesan kaj unikan eldonaĵon, kiu certe ĝuos en Eŭropo grandan sukceson.

Henriko Gielb.

**Ek al Manĉoukŭo!** 26-paĝa gvidlibreto, formato 13x19 cm, kun aldonita landkarto. Eldonita de: Ĝenerala Direkcio de Fervojoj, Sud-Manĉuria Fervoja Kompanio (S.M.R.), Mukden, Manĉukuo.

La tre bone presita kaj riĉe ilustrita broŝuro pruvas ke ĉie en la mondo ekzistas interesaj kaj belaj regionoj kaj urboj vizitindaj... kaj viziteblaj. Manĉukuo estas lando rapide evoluanta: ĝi ampleksas 1,300,000 kv.-kilometrojn kaj havas 33 milionojn da loĝantoj. La ĉefurbo estas Ŝinking kun 225,000 loĝantoj; sed pli grandaj estas Mukden (495,000 loĝ.) kaj Harbin (460,000). — La sama kompanio eldonis ankaŭ tre efikan faldprospekton sub titolo:

**Kiam alvenas, tiam ekveturas!** La prospekto estas trikolore presita, kun 10 ilustraĵoj, situplano kaj indiko de vojaĝ- kaj hotelkostoj. Entute: tre lerte farita:

**Parolado de Ĉefministro Princo A. Kono** pri la ĉina afero en la 72-a sesio de la Imperia Parlamento. — 4-paĝa represo el « Orienta Kulturo », dec. 1937. — Senpage dissendita al 50,000 geeperantistoj tra la mondo. — Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka 228, Tokio, Japanujo, sendas la paroladon kune kun numero de « Orienta Kulturo » al ĉiu petanto kiu ensendas unu resp.-kupono.

**La vivo de sankta Hōnen.** De Isii-Mamina M. A., profesoro de urba komerca kolegio de Yokohama. Tradukis kaj kompilis la noton Nisida-Ryōya. — 48 paĝoj kun 23 paĝoj da detalaj notoj pri propraj nomoj kaj budkismaj terminoj. — Kartonita, 13x19 cm. — Memeldono de la tradukinto. — Prezo 0,75 guld. aŭ 5 resp.-kup., inkl. afranko, rekte de la tradukinto, s-ro Nisida-Ryōya, Saihōzi, Goken'yamati 302, Kisiwada-si, Japanujo.

Por okcidentano estas ne facila tasko kompreni legi tekston pri tipe ekstremorientaj religiaĵoj. Ofte la senco estas nebula, ofte oni miras pri la naiveco (laŭ nia opinio) de l' aspekto aŭ de l' percepto. Oni eksentas la neceson de profunda meditado por atingi la bezonatan komprenstupon, kaj samtempe tamen oni havas la impreson, ke okcidentano neniam alvenos al tia perfekta stato, kiu ekz. trovas plenan kontentiĝon, eĉ beatiĝon per konstanta praktikado de Nenbutu. Kio estas tio? Japane « nen » signifas alpreni ion en la koron, fiksian penson sur io. « Butu » estas japana prononco de sanskrita Buddha; do la tuto signifas koncentri sian penson al Budho. En Budhismo ekzistas diversaj specoj de Nenbutu. En la doktrino de Hōnen ĝi signifas la alvokadon de la nomo de Amida-Budho, por naskiĝi en la Puran Landon (mondo de absoluta nenio, el kiu ĉio aperas).

Tio estis la ĉefesenco de la instruo de l' budhisma sanktulo Hōnen (1133 — 1212 p. Kr.). Li estas la fondinto de la Zyōdo-sekto de l' norda Budhismo. Laŭ japana oficiala statistiko de 1933 ekzistis ĉ. 17.500.000 kredantoj, 64.000 pastroj kaj 31.000 temploj, devenantaj de Hōnen kaj liaj disĉiploj. (Kompare estu indikataj nombroj de aliaj sektoj de l' Budhismo: ĉ. 23.500.000 kredantoj, 95.000 pastroj, 47.000 temploj.)

De la vidpunkto de historia situacio, Hōnen povas esti konsiderata la Martin Luther de l' ekstrema Oriento.

La lingva esprimo de la tradukinto estas ne mallerta; tamen troviĝas lokoj, kie la stilo estas malglata, eĉ gramatikaj (kaj precipe pres-) eraroj. Ekz. « Oni povas praktiki N. dum piediranta, staranta, sidanta aŭ kuŝanta » (pĝ. 21). Sed se oni alpensas « stato », ĉio estas en ordo.

Krom klarigaj Antaŭparolo kaj Prepara Ĉapitro al la kompreno de l' serioza leganto helpas aldonita indiko kaj landkarteto kun indiko de la ĉefaj lokoj.

Kiun allogas la Oriento kun siaj multaj kontrastoj al Okcidento, tiu certe trovas interesa ĉi tiun vivon de sankta Hōnen. B. K.

**Paekbohuan** estas la nomo de medikamento, kiu fabrikas japana firmo: Farmacia Fako de Heiŭado Akcia Kompanio, 60 Kensi-cho, Seoul, Korea (Koreujo). La medikamento en formo de piloloj estas pakita en skatolo, kun jena enskribo en Esperanto: « Tiu ĉi medikamento estas heredita de Kasjancenjen, antikva ĉina diulo, kaj mistere efikas por plifortigi korpon, cerbon, seksorganojn, stomakon kaj estas laŭdata jam de longe de multaj uzantoj. Se oni uzas ĉi tiun medikamenton ĉiutage, oni povas vivi tre longe sen malsano dum la tuta vivo. » Sekvas informoj pri kuraceblaj malsanoj, uzmaniero kaj prezo. Interesuloj skribu al la nomita firmo.

**Provu vian inteligentecon!** Kalkul-ludo konsistanta el 7 diverskoloraj kartetoj, kun reguloj en lingvoj germana, angla, araba, franca, kaj Esperanto. La ludo estas interesa, la ĉefludanto povas ŝajni magiisto, tamen la « solvo de la mistero » estas tre simpla. Ludo taŭga por lerni la nombrojn dum grupkunvenoj. — Eldonis: Tadros Migalli, ĵurnalisto, Fajum, Egiptujo. — Por 5 resp.-kuponoj oni liveras 6 ekzemplerojn de la ludo.

**La kvar sezonoj en Italujo.** 32-paĝa (formato 21,5 x 21,5 cm), arte aranĝita kaj arte prezentita broŝuro, en nemultaj vortoj sed tre multaj bildoj traktanta pri la allogo de la kvar sezonoj en Italujo. La bildoj estas lerte elektitaj, ili ĝenerale estas belegaj kaj tre bone presitaj (kelkaj reproduktaj de pentraĵoj eĉ en la originalaj koloroj). Entute: unu el la plej belaj tiu-spacaj eldonaĵoj ĝis nun eldonitaj en Esperanto. — Eldonis ENIT, Roma, ĉe kiu ĝi estas senpage ricevebla. (Nia redakcio havigas la broŝuron al interesuloj kontraŭ resp.-kupono.)

**Svislando en la neĝo.** Ankaŭ nunvintre la « Svisa Turisma Centralo, Zürich » eldonis 24-paĝan broŝuron (12x18 cm) sinoptike informan pri la vintroportlokoj en Svislando. Bone presita dukolore, multe ilustrita, tre rekomendinda al ĉiuj, kiuj serioze interesigas pri la vintro-sporto. (Ili senpage petu la broŝuron de la citata adreso.)

**Vintro en Svislando.** Multkolora afiŝego 64x102 cm, eldonita de Schweizerische Verkehrszentrale (Svisa Turisma Centralo), Bahnhofplatz 9, Zürich, Svislando. La afiŝo montras alegorie la allogon de Svislando dum vintro pro la vintro-sporto (skiado). La Turisma Centralo, dissandante la afiŝegon (kun Esperanto-teksto) petas speciale, ke oni fiksigu ĝin je loko bone videbla de publiko, kaj ke oni ne kaŝu ĝin en nuraj kolektoj. Gesamideanoj, agu laŭ tio pri ĉiuj afiŝoj!

**Amsterdam — Esperanto — Xa Jubilea Kongreso — La Estonto Estas Nia — 16-17-18 Aprilo 1938.** — Jen teksto de sigelmanko, verde presita, en formato 3,3x5,4 cm. Oni povas aĉeti folion de 30 sigelmankoj por 0.10 guld. ĉe la sekr. de LKK: F-ino E. Keller, Fred. Hendrikplantsoen 104, Amsterdam W., Nederlando.

**Cinquantaj anys d'Esperanto.** (Kvindek jarojn Esperanto.) Lukse presita broŝuro katalunlingva, 55 p., 17 x 24 cm. Eldonita de: Commissariat de Propaganda de la Generalitat de Catalunya en Barcelona, por memorigi pri la 50-jara jubileo de Esperanto, okaze de ĝia celebulo la 12.9.1937 en la Kultura Domo de Barcelona. Kun tri portretoj kaj vico da artikoloj pri Esperanto kaj la Esperanto-movado. Bonega propagandilo por nia lingvo, allogge prezentita, kiu certe ne restis sen efiko.

**Serio de 12 poŝtkartoj** aperis sub la titolo « Procés de la revolució Eŝpanyola 1909-1937 » ĉe la Generalitat de Catalunya, Barcelona. Ili montras landkarton de Hispanujo kun karakterizaj revoluciaj momentoj (alegorie), kun tekstoj en lingvoj kataluna, hispana, franca, angla kaj Esperanto. — Krome aperis tri ilustritaj kartoj kun Esperantoteksto: Laborista unueco; Helpu la hispanan armeon de la libereco! kaj: Dispremu faŝismon! (La bildoj de la du unuaj estas taŭgaj, tiu de la lasta efikas naive, eĉ iom komike.)

**Helpa Komitato** al la viktimoj de l' portugala faŝisimo, 24, Rue Richer, Paris 9, eldonis karton kun bildo de karcero; teksto en lingvoj portugala, esperanta kaj franca. Prezo ne indikita.

**A. Viruly: Por la honoro de nia lando.** Pledado por aertrafiko super la militpensado. El holanda lingvo tradukis P. W. van Sijn. — 22 p., 12 x 18,5 cm. Prezo 0.20 guld. ĉe la eldonejo D. van Sijn & Zonen, Rotterdam, Nederlando.

**E.M.L. Kalendaro 1938.** 16 p. 11x15 cm. kun kovrilo. 6-paĝa kalendaro, la resto ilustraĵoj kaj reklamoj pri libroj el la eldonejo Aleš Berka, Brno II, Ĉeĥoslovakio. — Ŝajne ricevebla senpage.



**Ce nia kunlaboranto s-ro R. F. Vaughan.**

Jam ofte la esperantistaro havis okazon, legi la ĉiam interesajn artikolojn aŭ felietonojn de nia kunlaboranto s-ro R. F. Vaughan, kiu ĉerpas siajn temojn prefere el la vivo orienta. Hodiaŭ ni prezentas s-ron Vaughan (x) en la societo de japanaj gegastoj. La foto estas prenita antaŭ la biendomo de s-ro Vaughan, « Verdavalo », en Sandakan, Brita Norda Borneo. (Vidu en tiu ĉi numero ankaŭ la artikolon « El la taglibro de plantisto », de s-ro Vaughan.)

**Muuses Esperanto-Biblioteko.** Dua serio. Tuta serio de 10 volumetoj kostas en abono 2,50 ned. guld., unuopa numero 0,35 guld. aŭ 3 int. respondkuponojn. Havebla ĉe Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen. (Recenzon de la unua libreto de Dua Serio vidu en Heroldo n-ro 43/950.)

**N-ro 12. Joël Thézard: Nordnordaj fabeloj,** ilustritaj per kvin desegnoj de la aŭtoro.

La akcentita nordeco en la titolo indikas al ni, kie estas la scenejo de ĉiu tiuj fabeloj: en la plej alta nordo. Ni trovas nin en Hammerfest, ĉe la Norda Promontoro, en Spitsbergo kun ĝia mirinda fjorda kaj glacimonta naturo, kaj en la lasta „fabelo“ (pli ĝuste oni nomus ilin rakontojn) „La vikinga ŝako“ ni vivas eĉ en la heroo sed kruela kaj sovaĝa tempo de la Vikingoj, en la jaro 1000 p. Kr., proksimume tiam, kiam Ruĝhar' Eriko „tra grandaj glaciaj, nebulegaj kaj ventegaj danĝeroj elŝipiĝis sur vasta lando, kiun, jarcentojn pli malfrue, oni nomis Ameriko“.

La fabeloj estas lerte kaj streĉe verkita. La aldonitaj desegnoj pliiĝas ilian ĉarmon. Kun escepto de la lasta fabelo, ili taŭgas bone kiel legajo por geknaboj.

La verkisto kaj desegnisto Joël Thézard, franco, multe vojaĝinta de Maroko ĝis la polusaj glacioj, estas esperantisto de proksimume kvar jaroj kaj jam konata en nia movado. Ni rajte povas atendi de li ankoraŭ multajn lego- kaj desegnofruktojn. Jofebo.

**N-ro 13. Ivan Ŝirjaev: En la vagono,** kaj aliaj rakontoj.

Malnova samideano, multjara esperantisto, batalinto fervora kaj senlaca — jen kelkaj trajtoj de l' aŭtoro de ĉi tiu volumeto. Nian lingvon li eklernis en 1895; en 1933 li mortis. De dum tuta generacia tempo li servadis al Esperanto.

Laŭdinda estas la decido de la redakcio de M.E.B. publikigi kelkon el la postlasitaĵoj de pastro Ŝirjaev. Tiamaniere lia nomo almenaŭ ne tiel rapide forviŝigos el la memoro de la esperantistaro, kaj el siaj rakontoj ankoraŭ ofte parolos la simpatia pastro.

Li estis diligenta laboranto sur literatura kampo, tradukante kaj originale verkante. Spe-

cialan meriton li akiris per la iniciato de « Enciklopedio de Esperanto », verkego kies finpretigon li bedaŭre ne povis ĝisvivi.

El la rakontoj de tiu malnova batalinto lumas la vera rusa homo kaj la naturo de l' vasta Ruslando. En „La malamiko“ li igis Esperanton ludi rolon tute indan al la spirito de nia kara helplingvo.

Preso, papero kaj — laste-nelaste — lingva formo same bonaj kiel en la antaŭaj libretoj. Jofebo.

**Jan Filip: Fino de la mondo.** Simbola socia simfonio en tri aktoj. 58 pĝ. 12,5x18,5 cm. broŝ. Prezo 8 ĉ. kr. ĉe la eldonejo E.M.L., s-ro Aleš Berka, Brno II, Ĉeĥoslovakio.

Venkis materialismo, venkis ateismo; infero de malbonaĵoj bruligas la mondon, savon proponas la Kruco: jen malmultvorte la enhavo de tiu ĉi teatraĵo. Ĝi estas ne malbone kunmetita, kaj supozeble ankaŭ efika, se bone ludata; sed tute tiel simple la problemoj surteraj ne estas solveblaj.

Mi malfacile komprenas, kial la aŭtoro la du plej aĉajn rolulojn en la dramo igas esti « judaj tipoj ». Ĉu ne ekzistas jam sufiĉe da antisemitismo en la mondo? Kaj ĉu aĉeguloj ne troviĝas en ĉiu raso kaj en ĉiu religio? Ĉu ne Kristo mem sin kalkulis ano de la juda popolo, ĉu ne liaj plej fervoraj apostoloj estis el la juda gento?

La lingvo ĝenerale estas bona. La aŭtoro tro uzas la sufikson -ig- (akcentigas, prokrastigi, frakasigi, fiksigi, kaŭzigi ktp.), « nombro » ne estas « numero », « supera » ne estas « supra », « min ĝojas » ne estas pli taŭga ol « mi ĝojas ». La preso estas bona, la bindo malbona.

Al katolikoj la verketo certe estas bonvena, kaj ne estas dubo ke iam oni vidus ĝin sukcese prezentata sur scenejo dum iu kongreso de IKUE aŭ de ĝiaj landaj sekcioj.

R-ano.

**Traduko de la provtekstoj en la gvidlibro** proponita de Profesoro G. Waringhien, prezidanto de FEI. Kolekto de Franca Esperanto-Instituto N-ro 5. — 61 p., 12 x 18 cm. — Eldonita de Franca Esperanto-Instituto, Lille. Prezo 15 francaj frankoj. Mendebla ĉe Societo Franca por la Propagando de Esperanto, 34 rue de Chabrol, Paris 10.

**Daŭriga kurso post Cseh-kurso.** — Kompilata de Margarete Saxl. — Eld. Dana Esperanto-Librejo, Thyrasvej 15, Aabyhöj, Danlando. Prezo: 7,50 kr.; por 4,15 gld. (inkl. sendkostoj) havebla ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen (Nederlando).

Ofte oni aŭdis plendojn ke, partopreninte Cseh-kurson, oni ne povis daŭrigi la studadon sammaniere. Per sia kurso f-ino Saxl forigis ĉi tiujn plendojn. La kurso enhavas 12 ciklostilitajn lecionojn pri diversaj partoj de la gramatiko kaj samtempe ripetigas partojn el la elementa Cseh-kurso. Ĝenerale oni propagandas Cseh-kursojn dirante, ke la kursanoj ne bezonos fari hejmtaskojn. Tiu starpunkto tamen ne estas aplikata en la kurso de f-ino Saxl, kontraŭe, en la konsiloj al la instruanto oni legas: Estas konsilinde, traduki en la nacian lingvon la ekzercofoliojn, por kontroli, ĉu la kursanoj bone komprenas la tutan tekston. Se eksterlandano gvidas la kurson, li petu spertan lokan samideanon kontroli la tradukon. — Agante tiel ni ne vidas multan diferencon kun aliaj kursoj, ne-Cseh-kursoj. Tamen la enhavo estas bona. Nur la prezo estas niaopinie tro alta.

W. F.

**Eilernu!** — Progresiva kurso de Esperanto. Verkita de D-ro Francisko Szilágyi. — Eld. Literatura Mondo, Budapest. 110 p. 15x23 cm. Prezo 1,10 gld. Havebla ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen (Nederlando).

Ĉi tio estas vere interesa libreto, kunmetita laŭ la rekta metodo. La enhavo estas tre varia. Gramatiko, konversacio, literaturo, ludoj ktp. Plie ĝi estas ilustrita. En la manoj de bona kursgvidanto ĝi certe multe amuzos la kursanojn, kaj la prezo estas ne tro alta. La libreto enhavas dek ok lecionojn. Ĝi certe trovos sian vojon. W.F.

**Ponto al la Praktiko.** — Materialo por lego kaj traduko kun klarigaj notoj. — 61 p. 15x23 cm. — Eld. Ned. Esp. Asocio « La Estonto estas nia », Pythagorasstr. 122, Amsterdam. Prezo: 0,50 gld. Mendebla ĉe Heroldo de Esperanto, Scheveningen (Nederlando).

Tio estas tre rekomendinda libreto por personoj, kiuj finis elementan kurson pri Esperanto. Ĝi enhavas kolektaĵon da spritaj vortludoj, traduktaskojn, kiuj ridigas la tradukonton. Ankaŭ en grupesperoj ĝi estas tre bone uzbla por igi la ĉeestantojn fari diktajojn aŭ por ĉerpi el ĝi materialon por konversacio. Komprenoble ĝi estas nur uzbla de nederlandanoj, ĉar la klarigaj notoj estas en la nederlanda lingvo.

Trastudinte la libreton, oni certe spertos, ke oni multe progresis en la scio pri Esperanto. Kursgvidantoj, ne forgesu atentigi viajn kursanojn pri ĉi tiu malmultekosta helpilo en la studado. W.F.

**W. F. Kruit: Wat de A-candidaat van de geschiedenis van Esperanto moet weten.** — 16 p. kaj kovrilo, 14,5x20,5 cm. Prezo 0.15 guld. Eldono: F.L.E., Postbus 0.50, Amsterdam, Nederlando.

Konciza, kaj ĝenerale ankaŭ klara kaj trafa prezento de tio kion la kandidato por Esperanto-ekzameno (A-diplomo) en Nederlando devas scii pri la historio kaj stato de nia afero. Estus tamen utile, se la kandidatoj sciis ankaŭ ion pri la rilato de la grandaj filozofoj (Komensky, Descartes, Leibniz) al la mondlingva ideo.

En la enkonduko oni parolas pri la internaciaj kongresoj de UEA, SAT kaj IKUE; la unuan oni devus prefere nomi per ĝia oficiala titolo « Universala Kongreso de Esperanto » (dum iuj jaroj eĉ okazis aparta UEA-kongreso krom la U.K.). En la ĉapitro pri la kongresoj oni povus mencii ke la nombro de U.K.-anoj meznombre estas 1500, sed ke foje ĝi atingas 5000. Parolante pri « Heroldo de Esperanto », oni devus mencii ke ĝi estas semajna gazeto, — aŭ ĉu ne gravas la fakto ke en Esperanto aperas semajngazeto jam en la 19-a jaro?

## Jubileo de Jozefo Mihalik de Hernádszurdok

Grandaj afiŝoj ĉie sur la Budapeŝtaj stratoj: la ĉefurba popolkleriga komisiono anoncas siajn diverspecajn kursojn. Inter ili per grandaj literoj: Esperanto-kursoj por komencantoj kaj por progresantoj... Jam de dek jaroj je ĉiu duonjaro aperas tiuj afiŝegoj, anoncanta la Esperantokursojn de Jozefo Mihalik. Generaciojn de esperantistoj li edukis dum tiuj dek jaroj, kaj estas interesa ludo de la sorto, ke tiu jubileo koincidis kun lia dekkvin-jara publika esperanta laboro kaj kun lia tridekjara profesora jubileo. Tuta aro da esperantistaj kaj neesperantistaj institucioj kaj asocioj festis tiun interesan jubileon la 18-an de decembro 1937, en la festa halo de la Federacio de Sociaj Asocioj.

La festkunsidon malfermis D-ro Aŭgusto Benárd, parlamentano, eksministro, la prezidento de la Hung. Esp. Federacio, kiu per elokventaj vortoj salutis la jubileanton. La liston de la parolantoj malfermis s-ino D-ro B. Halmi, kiu en la nomo de la « Pro Hungaria » (Virina Mondasocio) prezentis en verva parolado la meritojn de Mihalik, kiu per Esperanto akiris tiom da amikoj al Hungarujo. D-ro Eugeno Javorniczky, ministra konsilanto, transdonis la Jubilean Krucon de la Federacio de Sociaj Asocioj kun arta diplomo, tiun unuan honorigon, kian pro esperantaj meritoj ankoraŭ neniu ricevis en Hungarujo. La festparolanto estis Oskaro Augusztiny, la landa direktoro de HEF, kiu per esperanta kaj hungara parolado konigis la agadon de la jubileanto, kiu per multjaraj sinoferaj klopodoj atingis, ke ankaŭ la oficialaj rondoj en Hungarujo jam alte taksas Esperanton.

Sekvis salutparoloj de la senditoj de la esperanto-asocioj kaj grupoj de Hungario kaj de multaj gravaj neesperantistaj asocioj kaj kazinoj. En nomo de HES salutis D-ro L. Lóránt, la salutleteron de IEL kaj la salutvortojn de ĉefdelegito Balkányi, kiu pro malsano forestis, prezentis Prof. A. Pechan, en la nomo de la Hungara Esp. Pedagogia Asocio, ĝia prezidento D-ro K. Kalocsay en sia belsona kaj elokventa esperantlingva parolo salutis ĉi transdonis la diplomon de HEPA, kiu elektis la jubileanton eterna honora prezidento. Granda interesiĝo sekvis la varmajn salutvortojn de J. Baghy, kiu ĵus la antaŭan tagon revenis el Norda Eŭropo. En nomo de Literatura Mondo kaj la hungaraj Esperanto-verkistoj salutis L. Totsche, en nomo de la Landa Hung. Katolika Esp. As. St. Zöldy, poŝtĉefinspektoro. Salutis ankaŭ la Nacia Rákóczi-Ligo, la Pola Turista Esp. Asocio, profesoroj kaj instruistaj asocioj, kaj en nomo de la estintaj lernantoj kaj kursanoj f-ino M. Szentgyörgyi. El la multaj salutleteroj estu menciitaj tiuj de grafo J. Zichy, ĉefepiskopo; eksministro Lukács; ĉefdirektoro de la Hungara Poŝto barono G. Szalay; kaj multaj aliaj.

Fine la jubileanto per emociitaj vortoj dankis la salutojn kaj promesis siajn energion kaj laborkapablon plu dediĉi al la afero de Esperanto. A.P.

### Oficialaj kursoj de Esperanto aranĝitaj de la urbo Nancy (Francujo).

Dank' al la klopodoj de la Esperantista Grupo en Nancy, kaj dank' al la favoro por Esperanto de s-ro P. Hornac, fakestro en la Instruado-Sekcio de la Urbo, — la urbestro de Nancy decidis disponigi lernejan klason kaj pagon por instruisto kaj oficialigis du kursojn de Esperanto sub la nomo « Cours Municipal d'Espéranto ».

Ambaŭ kursojn (unu por komencantoj kaj duan por progresintoj) kun pli ol 50 personoj tre lerte kaj busnukcese laŭ rekta metodo gvidas s-ro Henriko Gielb el Varsovio, kiu preparas nun sian doktor-ekzamenon en juro ĉe la ĉiftia universitato.

## Insulo Esperanto

Sep kilometrojn oriente de Orehovo, en la mezo de la larĝa riverego Danubo, troviĝas insulo, nomata insulo « Esperanto ». La unua teritorio sur la tero, kiu ricevis la nomon « Esperanto ».

Oni diras, ke estis en la jaro 1900, kiam unufoje tiu insulo naskiĝis. Poste la akvoj de l' Danubo ĝin rekovris. Sed kiam la milito (1914-1918) estis jam finita, oni vidis, ke duan fojon la insulo aperis.

En la komenco ĝi estis tre malgranda, nuda, eĉ ne unu arbeto, nur sablo...

La Orehovaj esperantistoj tre ofte faris siajn ekskursojn en la ĉirkaŭaĵojn de Orehovo. Unufoje en 1926 ili ree vizitis tiun insulon. Oni disputis, kiu kuŝu sub la ombro de la unua, sola arbeto-salikko...

Tiel, de tempo al tempo, niaj Orehovaj gesamideanoj vizitis, vizitadis la insulon.

Venis 1932. Jam la insulo estas surkreskata de salikoj, tremoloj, poploj kaj aliaj arboj. Ĝia surfaco, ĝia supraĵo estas jam grandeta; ĝi havas ĉ. kvarcent-kvincent dekarojn, kaj kiam la akvoj de Danubo estas tre malgrandaj, kiam la nivelo de la riverego estas tre malalta, ĝia surfaco okupas ĉ. okcent ĝis mil dekarojn: du kilometrojn longa kaj duonan kilometron larĝa ĝi tiam estas. Ili, la esperantistoj, nun tre ofte ĝin vizitas.

En 1933 la Esperanto-societo Orehovo sendis leteron al la Orehova komunumo, per kiu ĝi petis la magistraton doni la insulon al la societo (ĝi estis komunuma societo). Tiel, laŭ kontrakto, ĝis 1953 (dum dudek jaroj) la insulo apartenas al la societo « Zamenhof ». « La insulo » — oni tiel ĝin nomis — ricevis la nomon ESPERANTO. La societo sin devigis, laŭ la kontrakto, fari sur la insulo banstrandon. Nun, sur « Esperanto » la societo havas dometon kun tri ĉambroj, kiu kostis ĉ. kvin mil levojn. Ĝi estis konstruita en 1933. Krome ĝi havas ankoraŭ alian dometon kun du ĉambroj, konstruitan en 1935. Ankaŭ unu puton, kiu donas al la somerumantoj puran kaj tre bongustan akvon. La insulo « Esperanto » estas multe vizitata en la somera sezono de urbanoj kaj vilaĝanoj. La sablo kuracas la reŭmatismojn.

**Frua printempo.** Danubo, apenaŭ liberiginta de la glacia tavolo, brilas kiel spuglo. De tempo al tempo nur milda venteto sulkgigas ĝian glatan supraĵon. Kaj ree regas kvieto... majesta kvieto!

Jen — fruiĝinta mevo alflugas kriante, jen — paro da cigno, jen aro da babilantaj anseroj, kaj ĉiuj ili flugas al la insulo « Esperanto » por trovi siajn malnovajn nestojn. Kaj ĝi — « Esperanto » — treme atendas siajn unuajn gastojn. La blanktrunkaj poploj, tremoloj kaj flekseblaj salikoj salute klinas siajn suprojn; ja baldaŭ birdkantoj eksonos!

En la malproksimo konturiĝas velboato blanka kiel cigno. Ĝi alproksimiĝas kaj, jen, alnaĝas al la sabla bordo. Homoj, kun brilantaj okuloj, eliras sur la bordon. Ili estas anoj de la Orehova societo esperantista, venintaj ĉi tien por revidi sian karan terpecon kaj pristudi la antaŭstarantan laboron. Ili socirango estas malleĝala, sed mirinde — jen doktoro amike konsiliĝas kun ŝuisto, instruisto kaj laboristo frate ĉirkaŭprenitaj esprimas sian emociion, advokato kaj terkulturisto fere kaj kore ekkantas la « Esperanto ». La forta spirito de homamo estas sentebla, ia nemezurebla amo al io sankta kaj kara kunfandas ilian socirangan malegalecon kaj kulturenan nivelon; ĉi tie ili estas nur esperantistoj, en kies koroj vibras la amo al la tut-homaro.

Post detala pristudo ili enboatiĝas, ĵetas lastan adiaŭnan rigardon al la insulo, kaj la remiloj ritme ekplaŭdas, forportante la grupeton. Ekkrias ie blanka, frue veninta mevo.

**Varma somero.** Insulo « Esperanto » svarmas

de somerumantoj: iuj baniĝas, aliaj kuŝas sur la varmigita pura sablo, superversate de la vivigaj sunradioj. Grupeto da bankostumitaj ĝeĵunuloj amuziĝas, ludante per pilko. Aro da infanetoj tute nudaj, kun pafarkoj enmane, estas la indiĝenoj-sovaĝuloj, kiuj ĉasas en la « praarbaro » leonojn. Iliaj korpoj, brunigitaj de la suno, spiras forton kaj sanon. Jen ĉarma knabina voĉo ekkantas, akompanate de remilplaŭdoj, jen brua rido pro ŝerco ia, jen aŭdiĝas ravaj kaj revigaj akordoj de gitaro, por esti sekvataj de mandolina tremsonado. Kaj la gepatroj, sin sentante komforte sub la ombro de l' salikaro, trinkas freŝigaĵojn, ĝuas la bonhumoron de siaj gefiloj kaj intersvatas. Kaj la verda standardo flirtas super la tegmento de modesta ŝirmdometo — frukto de penplena laboro — kaj profetas baldaŭan pli bonan vivtempo.

Vesperigiĝas. Tie kaj tie ĉi fajregoj ekflamas, kaj la ombroj de salikoj kaj homoj ekdancas misteran, fabelan dancon. Luma strio de falanta stelo trairas la firmamenton. Griloj ektrilas, akompanate de salikara flustrado. Susuras la ondoj. La tuta naturo kantas...

Mirinda Danuba noktomezo surkovras la insulon « Esperanto ».

**Aŭtuno jam regas.** Malvarmetaj ventoj ekblovas, pelante la falintajn foliojn velkiĝintajn. La insulanoj jam estas malmultaj. Ili sporte fiŝkaptas, parolas pri bonŝancaj fiŝkaptadoj (fantaziado!), enpasiĝas, fiŝeto fariĝas centkilogramma siluro. Nur malofte ili kuragiĝas demeti la vestojn kaj fari « freŝigan banon », ja la akvo jam estas malvarma.

Fine ankaŭ ilin la vento forblovas. Nur aro da grupoj kaj sovaĝaj anseroj transflugas, celante la malproksimon.

**La vintro venis.** Insulo « Esperanto » estas sub dika, blanka tavolo da neĝo. Sur Danubo estas portataj de la fluo grandegaj pecoj da glacio, kiuj amasiĝas sur la bordojn de la insulo. Miriga, montra forto starigas, kvazaŭ ludilojn, grandegajn glaciecojn, por ke ili tuj estu disrompataj de aliaj. Neimagebla, timiga krakado kaj bruo aŭdiĝas. Fine la norda vento glaciigas la tutan riveron kaj ĉesigas la batalon de l' glaciamasoj. Nun la teruro estas ŝanĝita per ĉarma vidaĵo, precipe ĉe lunbrilo, — vidaĵo kiun ĝenerale nur la nordpolusaj esploristoj ĝuas. La sola estaĵo, kiu vagas dumnokte kaj kies postsignoj krosas la neĝon, estas la lutro. Nur malofte, tre malofte, oni vidas tie homajn postsignojn. Ili estas de iu verdstelano, pelita de nostalgio al la kara terpeco.

Tia estas la insulo « Esperanto » dum la kvar sezonoj de la jaro. Iloje gastama, milda, alifoje timiga, sed ĉiam ĉarma!

Eble, ĉar ĝi estas NIA!

D. Kovačev, Sofia.

## Ni funebras

— S-ino MARTHE PETIT, Honora kaj Dumviva Membro de IEL en Dijon, Francujo, mortis la 11.12.1937. Niajn korajn kondolencojn al la familio de nia ĉiam helpema samideano!

— S-ro ILMARI WIRKKALA, instruisto en Vaasa, Finnlando, subite mortis pro korapopleksio la 13.12.1937, ĵus fininte sian 50-an vivojaron. Li postlasas funebrantajn edzinon kaj tri infanojn. S-ano Wirkkala estis jam malnova (de 1911) kaj fervora esperantisto. Lia edzino (Selma nask. Moerner) estas germanino el Dresden. Ili geedzeco estis vere esperantista, kaj ankaŭ la infanoj parolas nian lingvon. — Koran kunsenton al s-ino Wirkkala kaj la infanoj!

## Portugala universitato festis centjaron

Dum 1290 portugala reĝo Diniz fondis en Lisboa la unuan portugalanan universitaton, kiu estis nomata « Ĝeneralaj Studoj ». Por ĝi la reĝo alvenigis al Portugalujo kelkajn alilandajn profesorojn, precipe francajn.

Sed la tiam universitato ne daŭre restis en la ĉefurbo. Dek-sep jarojn poste la reĝo ordonis ĝian translokigon al Coimbra. Dufoje ankoraŭ ĝi alvenis al Lisboa, kaj fine dum 1537 reĝo João III por ĉiam ĝin starigis en Coimbra.

Estas do la kvara centjaro de tiu definitiva starigo, kiun Portugalujo festis en la dua semajno de decembro.

Tiu centjarfesto enhavis karakteron de nacia festo. Vere la Universitato de Coimbra estis dum multaj jaroj la ĉefloko de la portugala intelekta vivo<sup>1)</sup>. Tie studis multaj homoj kiuj servis kaj honoris nian patrujon, tie instruis mondkonataj portugalaj sciencistoj.

Dum la unua periodo de la universitato tie estis profesoroj: Pedro Nunes, fama matematikisto, Garcia da Orta, eminenta botanikisto, kaj, el la alilandanoj, Pedro Hispano, kiu estis poste Papo Johano XXII.

En 1537 la universitato estis tute aliformigata. Tiun aliformigon efektivigis tre notinda portugala pedagogo, André de Gouvea, kiu estis profesoro de Rabelais kaj Montaigne kaj kiun tiu lasta nomis « le plus grand principal de France ».

Portugalujo, kies kultura vivo devenas de la franca kultura vivo kaj estas ankoraŭ plena de franca spirito spite al la anglaj kaj lasttempaj germanaj enmiksoj tiurilate, instruis tiutempe pensadon al Francujo: Tri el la tiamaj rektoroj de la Pariza Universitato — la Universitato de la mondo — estis portugalaj. Francisko Sanches, antaŭinto de Descartes, estis profesoro en Toulouse kaj Montpellier, post brilegaj studoj en Coimbra.

En la Universitato de Coimbra studis la plej granda el la portugalaj: Luiz de Camões, aŭtoro de la nemortema verko « *Os Lusíadas* », la poemo de la permaraj portugalaj eltrovojaĝoj, « virgilia poemo en ariosta rimo », himno al la universaliga agado de Portugalujo dum la 16-a jarcento<sup>2)</sup>.

Tial tiu centjarfesto estis kvazaŭ nacia festo: estis popolaj manifestacioj kaj oficialaj solenaj kunsidoj kun la ĉeesto de registaranoj, universitataj profesoroj, eksterlandaj diplomatoj... Al Coimbra alvenis fremdaj profesoroj reprezentante universitatojn el 22 landoj. Al tiuj Prof. Caeiro da Mata, iama mi-

nistro, delegito de Portugalujo ĉe la Ligo de Nacioj, parolis tiel:

« Mi rigardis ĉiam la sciencan kunlaboron kiel unu el la plej bonaj rimedoj por la internacia amikeco. Oni perdis la fidon je gravaj politikaj interkonsentoj; plimalgrandiĝis la sento de reciproka konfido, sen kiu la plej lerte kontraktitaj akordoj ne havas praktikan trafon; evidentiĝis la malfortiĝo de nediskutata internacia aŭtoritato; eniris en la ombron — sendube nedaŭre — la granda Ĝeneva organizacio. Ni serĉu do en la scienca kampo tiun solidarecon de la nacioj,

kiun la politiko ĝis hodiaŭ ne sciis aŭ ne povis al ni doni...

— Al ĉiuj, kiu ajn estu ilia nacieco, al ĉiuj kiuj sin dediĉas al la intelektaj aferoj estas honoro kaj devo teni la idealon kaj ĝin suprenigi tiel alte, ke ĝi povu aperi iutage kiel la komuna centro de la pacigo de la nacioj. Tiu tago estos por ĉiuj homoj, kun la necesaj kuraĝigoj de la laboro, la tago de la venko de la paco kaj de la justeco. »

Belegaj vortoj kiuj malfeliĉe estas nur vortoj, ĉar eĉ en la scienca kampo regas internacia malamo, sed vortoj kiujn ni, esperantistoj, devas atenti, ĉar ankaŭ ni nin dediĉas al grava intelekta afero.

J. Bigotte d'Almeida.

## Senmorteco

La universala intereso pri senmorteco estas fundamente intereso pri daŭrema ekzistado. Tiu ĉi artikoleto resumas dek diversajn konceptojn de daŭrema ekzistado.

1. *Fizikaj elementoj.* La fizikaj elementoj, el kiuj konsistas la homo, daŭras ekzistadi post la morto kaj post disfalo de la korpo. La elementoj, en kiuj korpo estas laste analizebla, sendube estas nedetruibla. Laŭ la principo de la konservado de materio, ili neniam estis kreitaj kaj neniam estos detruitaj.

2. *Fizikaj efikaĵoj.* Ĉia efikaĵo estigita de homo, intence aŭ senintence, sur aliaj fizikaj aĵoj, estigas la mondon malsimila. Ĉiu fizika efikaĵo estas laŭvice kaŭzo de plia efikaĵo, ktp. ktp. Se ne estos plena detruo de efikaĵoj, kaŭza efikado daŭros iel senfine.

3. *Faktoj.* Faktoj aŭ veroj persistas eterne. Ĉiu fakto pri homa vivo restos eterne. Se homo unufoje jam vivis, ĉiam restos la fakto aŭ vero ke li estas vivinta.

4. *Biologia nasko.* La naturo de homo estas reproduktata, parte, en liaj geidoj. Do, tiel longe, kiel homo posedas gefilojn aŭ genepojn aŭ iajn idojn, lia naturo daŭras ekzisti (kvankam en konstante malkreskanta grado).

5. *Rasa daŭreco.* Iam homoj konsideras sin partoj de raso, kun kies bonstato ili estas identiĝintaj. Se homa personaĵo tiamaniere estas regata de la intereso por la rasa bonstato, tiel longe, kiel la raso ne ĉesas, lia propra persona intereso daŭras esti efektivigata — senkonsidere pri tio kio okazas al li individue. En semidaj religioj « senmorteco apartenas al la raso kaj la familio, ne al la persono ».

6. *Nacia daŭreco.* Nacia daŭreco, simile al rasa daŭreco, signifas daŭrecon de persono tiel longe, kiel naciaj interesoj regas lian personaĵon, kaj tiel longe, kiel tiuj interesoj estas efektivigataj en la daŭranta nacio. « Nenio po-

vus esti pli valora ol morti por sia patrujo. »

7. *Daŭreco de sociaj kaj kulturaj efikaĵoj.* Homo eble povas daŭri ekzistadi per la efikaĵoj, kiujn li heredigas al la socia kaj la kultura vivo. Tiaj efikaĵoj povas daŭri en du manieroj: aŭ (1-e) rekte, kiel ekzemple ĉe la « senmorta Ŝekspiro », kies verkoj konstante reinfluas novajn homojn en similaj manieroj, aŭ (2-e) nerekte, kiel elpensinto (inventisto) kiu preparas kondiĉojn bezonatajn por plia progreso, aŭ ankaŭ kiel erareganta ŝtatesto, kies decidoj longedaŭras en malkvieto tra jarcentoj.

8. *Rememora daŭreco.* Tiel longe, kiel restadas rememoro, ĉu per tombŝtono aŭ per monumento, ĉu per memoraĵo, ĉu per historia enskribaĵo, homo eble povas esti dirata ke li daŭras ekzisti. Kaj tiel longe, kiel estas la cel-eco de rememoro, eĉ pri tiaj antikvaj homoj, kies enterigitaj urboj ankoraŭ ne estas elfositaj, restadas en tiaj eblecoj iom da daŭreco.

9. *Nepersona daŭreco.* Homo povas daŭri ekzistadi, ne kiel individuo, sed sen individueco kaj sen personeco kaj sen konscieco, en korpo de eterna nepersona Estaĵo. Panteismo, bramanismo, taoismo kaj absolut-idealismo unuigas en la perspektivo ke personoj, kiel partoj de tuto, pereas, sed ke la tuto daŭras senfine.

10. *Persona daŭreco.* Homo povas daŭri ekzistadi kiel aparta kaj nekonfuz-ebila kaj konscia individuo. La variaĵoj de konceptoj de daŭreco de personoj kiel personoj entenas la jenon: (1-e) daŭreco de animo aparta de korpo; (2-e) daŭreco de animo kun sama korpo revivigata pli poste; kaj (3-e) daŭreco de animo en malsama korpo — ĉu en nur unu korpo, donacota ĉe « Reviviga Tago », ĉu en multaj korpoj, suferante tra senfina periodo de senĉesaj reenkorpiĝoj.

D-ro Arĉi Bahm.

<sup>1)</sup> Nun estas kvar universitatoj en Portugalujo, kaj tiel Coimbra iomete perdis tiun lokon.

<sup>2)</sup> Kalocsay tradukis Esperanten peceton el ĝi en « Eterna Bukedo », pĝ. 75-81.

# Oni raportas

## El Polujo.

**Eskulapo petolas: « Sinjoro, vi tute ne havas koron ». — Lepro, la vipilo de l'homaro, detruas polan virinon.**

Nia metropolo havas « siajn » sensaciojn sur medicina kampo. Jen: certa sinjoro, subite malbonfartante, konsultas kuraciston. La zorga tutkorpa esplorado reliefigas strangan diagnozon. La digestorganoj estas inverse lokitaj — kaj la koro — ĉu pro sopira migremo? — ŝanĝis « sian flankon ». Rentgena priadiado atestas nekontesteble la medicinan miraklon.

Pasintjare faris nia korofenomeno devigan militistservadon. Okulfrapa kaj samtenpe kuracista estas lia rakonto pri la taĉmenta kuracisto, kiu post perkuto de lia soldata brusto konstatis: « Sinjoro, vi tute ne havas koron »...

Lepro! La nura vorto kaŭzas glaciigon de l' sango. Ĉiu fugas, timante la haladzon de l' fraptuŝita viktimo, kies nura tuŝeto infektas kaj detruas ĉion. Al eksterlanda leprejo, t.n. «Leprosorium» oni ekspedis 53-jaran virinon, kiun frapis la sorto en plej kruela maniero: per lepro!

La forportado de la malsanulino estis sensacia. En grandega distanco gardstaris polico, raportistoj, eĉ fotografistoj penis. Pli proksime troviĝis kuracista komisiono.

La malsanulinon oni lokigis en aŭtomobilon, speciale destinitan por tiu celo. Ŝi portis nigran robon kaj tukon sur la kapo. Sin akompanis gardanto, vestita per speciala kombinaĵo ĝiskola. La kapon de la viro kovris blanka masko, liajn manojn dikegaj specialaj gantoj. Li sidis apud la kuŝanta malsanulino, tenante ŝiajn manojn, kiujn kovris la teruraj leprecaj signoj. Ŝi dormetis dumvojaĝe; super la palpebroj vidiĝis strangaj brunaj makuloj — lepro!

La kondukintoj de l' aŭtomobilo estis izolitaj zorge de l'interno. Je lokoj speciale destinitaj de la komisiono por higieno okazis provizado per nutraĵo kaj liverado de benzino.

En la eksterlanda leprejo oni provas kuraci tiujn kompatindulojn per orhavaj injektoj kaj karbneĝa kaŭterizado surhaŭta, helpe de speciale inventitaj instrumentoj. Ĝis nun oni ankoraŭ ne sukcesis trovi la savilon por tiuj vivantaj kadavroj — lepruloj, forstrekitaĵoj el la vico de ni, homoj.

*Minuŝka Mantel, Lwów.*

## El Svedujo.

**Svedo kiu fariĝis reĝo de kanibala insulo mortis: Karlo I de Tabar.**

Oni sciigis la morton de Kalle Pettersson, en Sydney, konata kiel la reĝo de Tabar. Kun lia forpaso malaperis romantika figuro de solida sveda forto.

Kalle Pettersson naskiĝis en 1875 kaj en frua aĝo fariĝis maristo kaj velis sub multaj flagoj. Multfoje li estis ŝiprompulo kaj pli ol unufoje raportita kiel mortinta.

En 1906 li estis en la Suda Maro kaj estis ĵetata sur la insulon Tabar, norde de New Mecklenburg, post rompiĝo de lia ŝipo. Unue ŝajnis, ke la kanibalaĵoj de Tabar volas fari el li ĉef-

manĝaĵon de bankedo. Evitante la kuirpoton, Pettersson ekamis filinon de la kanibala reĝo, Singdo Misses, kaj post reveno al la insulo, post vizito al la hejmlando li estis akceptata de la reĝo kiel bofilo. Post la morto de tiu estro la svedo suriris lian tronon. Lia edzino naskis al li naŭ infanojn, al kiuj li instruis la svedan lingvon, kaj kiujn li edukigis en misia lernejo.

Inter siaj sovaĝaj regatoj Pettersson ne forgesis sian hejmlandon aŭ civilizon. Li faris, kion li povis, por civilizi la indiĝenojn, instruis al ili bonajn kutimojn kaj aliajn manierojn de vivteno kaj konservis kontakton kun la ekstera mondo.

Antaŭ kelkaj jaroj mortis lia malhela edzino, kaj dum longa tempo li estis nekonsolebla. Dum sia lasta vizito al Svedujo li edziĝis kun angla sinjorino loĝanta en Stokholmo, nomata Jessie Simpson.

*(Laŭ Sved-Internacia Gazetservo.)*

## Paca mesaĝo el Ĉeĥoslovakio

En la vigilia nokto elsendis la ĉeĥoslovaka radio al la mondo mesaĝon de l' paco, simbole esprimitan de tri reprezentantoj de la demokratioj en tri kontinentoj. En Ameriko estis ĉe mikrofono plej elstara fenomeno de la samtempa scienco, la matematiko, Albert Einstein. Lin salutis el Ĉeĥoslovakio seniro de la ĉeĥoslovaka teknika scienco, inĝeniero D-ro František Krizik. En sia parolado li memorigis la grandegan disvolvon de l' modernaj sciencoj kaj akcentis, ke li persone ekkonis Edisonon en la komenco de lia teknika agado. Tio estas memorigoj, kiuj pravigas la esperon, ke la scienco kontribuos al la feliĉa kaj paca estonteco de la homaro. Inĝeniero Krizik, kiu parolis ĉeĥlingve kaj parte germanlingve, finis sian paroladon proklamante la kredon je la paco inter ĉiuj nacioj kaj homoj de bona volo. Angle interpretis la paroladon profesoro de la universitato de Karolo IV, D-ro Otakar Datoušek. Albert Einstein estis respondonta antaŭ la noktomezo. Ĉeĥlingven liajn vortojn estis tradukonta profesoro D-ro V. Hlavaty, kiu estas nuntempe gasto de la universitato en Princeton. Sed ekstreme malfavoraj ricevkondiĉoj kaj uragano super la oceano malhelpis la kompreneblecon de la mesaĝo de Einstein, kiun elsendis mallongonda stacio usona al Genevo kaj de tie per kablo al Praha.

Mallongan tempon poste Praha vokis Azion: la universitaton en Santiniketan en Brita Hindujo, kie tiutempe estis tago. Ĝi estas loĝloko de Rabindranath Tagore, de la granda hinda poeto kaj pensulo. Tagoron persone alparolis Karel Čapek, la mondkonata ĉeĥoslovaka verkisto. Li diris:

Majstro Tagore, harmonia voĉo de l'

Oriento, mi salutas vin en via Santiniketan, mi salutas vin el Ĉeĥoslovakio, kie nuntempe neĝas, el Eŭropo, kie ni sentas angoron, el la okcidenta mondparto, kie la plej kulturita nacio ne scias proponi al si reciproke la manojn kiel fratoj. Kaj tamen trans tiun malproksimon de la landoj kaj kulturoj ni etendas al vi la manojn: al vi, poeto de dolĉa saĝo, al via paca Santiniketan, al via granda Hindujo, al via vastega Azio, ankaŭ al tiu, kiu nuntempe estas detruata per armiloj, kiujn inventis la Okcidento. En la momento, kiam en la plej okcidenta kaj plej orienta regiono de nia komuna kontinento sonas la kanonpafoj, vokas vin mallaŭta voĉo de l'okcidenta demokratio: Vivu la mondo, sed ĝi estu mondo de egalaj kaj liberaj homoj!

La saluton kaj konfeson de Karel Čapek tradukis en la anglan lingvon kun kelkaj hindaj vortoj la universitata profesoro D-ro Vincenc Lesny, kiu mem en proksima tempo prelegos en la universitato en Santiniketan. Santiniketan, diris profesoro Lesny, signifas hinde « La Domo de l' paco ». Ĉi tiun pacon ni deziras al la tuta mondo. La mesaĝo de la ĉeĥoslovaka mallongonda stacio, bone aŭdebla sur la tuta azia kontinento, respondis Tagore telegrafe jene:

D-ro Karel Čapek kaj profesoro Lesny! En la terura uragano de malamikeco kaj perforto, kiu furiozas super la homaro, mi sendas al vi saluton de l' amikeco kaj bona volo. Transdonu ĝin de la maljuna homo, idealisto, kiu firme kredas je la komuna misio de l' Oriento kaj Okcidento kaj de la tuta homaro sur la Tero. Subskribita: Rabindranath.

*Stanislav Borovka.*

Rim. de red. — Rilate al la unue citita informo de nia raportantino, eble interesas la sciigo ke la lasta kompostisto-linotipisto de la Heroldo-presejo en Köln ankaŭ havis la koron dislokita, ne sur la maldekstra flanko. Tamen tiu fenomeno estas neofta.

## Nokto ĉe Balta Maro

Nokto, kiel inko, nigras sur la tero,  
Nur montpintojn kovras blanka neĝkovril'.  
De l' ĉielkurteno el veluro blua  
Ruze okulumas steloj cent kaj mil.

Post ventego ŝtorma muĝas Balta Maro,  
Bordon el granito lekas ŝaŭma ond'.  
Sur la horizonto trimastul' fantomas,  
Velojn ĉifonigas vento-vagabond'.

Baldaŭ sunleviĝo sangon verŝos onden,  
Kaj lumturgardisto iros al ripoz'.  
Nokton romantikan, plenan je fantomoj,  
Senedaŭre ŝanĝos tago de la proz'.

Ludmila Jevsejeva.

## El la taglibro de plantisto

### Vidaĵoj kaj pensoj

De R. F. Vaughan.

Lonicero\*) etendiĝis sur la malalta laŭbo, kiun la ĝardenisto por ĝi faris, kaj, abunde florante, plenigas la ĉirkaŭan aeron per sia bonodoro.

Jen plaĉa ĝarden-ornamo, tamen iom banala, ĉu ne ?

Sed ĝin rigardu denove ! Jen io *malbanala*, kion mi ne tuj perceptis !

Ĉar granda blanka koko, forvaginte el la kortbirdejo, havis la ideon suprenflugi kaj sin sidigi sur ties supro, kaj de tiu bonega observejo, serene rigardante sian mondon, neĝe-blanka, kun kresto kaj gorĝpendaĵo sange-ruĝaj, la birdo faras ĉarman kombinaĵon kun la verdaj folietoj kaj la kremkoloraj floroj parteruĝaj.

Kiel domaĝe, ke ne ĉeestas pentristo el unu malnova holanda skolo, kiu povus eternigi ĉiun detalon de tiu bela bildo, kiun sendube li trovus ĝuste laŭ sia gusto !

Kaj ni preskaŭ preterpasis, ĝin ne rimarkinte !

Do estu ĉiam atenta pri la naturo, tiu granda artisto ofte regalos vin per tiaj neatenditaj belaĵoj !

*Tragedieto.* Sur telefono-drato proksime de mia malfermita fenestro sidas kolibrino. En sia beko ŝi tenas grandan molan plumon de blanka kokino. La kolibroj estas birdoj malgrandaj, la kokina plumo estas tiel granda kiel la kolibrino. Malhele verda kun flava brusto, ŝi estas bela birdeto, kaj en ĉi tiu momento tre fiera kaj kontenta.

Ĉar jen efektive bona trovaĵo, bonega por la konstruata nesto ! Tial ŝi ne inklinas tuj demeti ĝin tien; antaŭe konvenas iom da fanfara paradado al la adreso de la edzo, kiu sidas apude sur la sama drato.

Birdmaniere ŝi diras: « Rigardu, mia

kara ! Do vi ne rimarkis ĉi tiun valoregan plumon, ĝuste tian, kian ni bezonas por la hejmo ? »

La edzo admiras, gratulas kaj kompreneble konsentas pri sia malsupera inteligento. « Efektive, mia kara, vi estas ĉarma, kaj kiel lerta ! »

Sed vento ekblovas, kaj la blanka plumego, forbloviĝinte el la beko de la kolibrino, falas sur mian skribotablon mem, kaj de tie la birdetoj ne kuraĝas ĝin repreni.

Ho ve, la tre havinda plumo perdiĝis ! La gekolibroj malĝoje forflugas. La kolibro ŝajnis edzo diskreta, supozeble li ne faros ian komenton pri ĉi tiu malŝelika okazaĵo.

Moralo : Ne malŝparu tempon, fanfaronante kaj vin admirante, sed agu !

\*\*

*Enŝtorma incidento.* Tiu, kiu familiariĝis kun la bestoj, scias, ke, kiel la homoj, ankaŭ ili ĝuas sian forton, rapidecon aŭ aliajn kapablojn, kaj, kiel ni, pri ili fieras.

Ekzemple: Plezurigas al birdoj mezuritan rapidecon kontraŭ trajnoj aŭ aŭtomobiloj, la « marporkoj » amegas ludi ĉirkaŭ la pruo de moviĝanta ŝipo; multaj el la hundoj tre fieras pri sia rapideco kaj sia kapablo, kuregante, subite sin turni eviteme, kiel ĉasata leporo.

Sendube vi tion rimarkis. « Venu, provu kapti min ! » diras unu hundo al alia, kaj mi mirigos vin per mia lerteco ! »

Sed ofte okazas, ke besto, kiel homo, tro alte taksas sian lertecon, kaj iufoje la invitito estas la pli rapida kaj la ekturniĝoj de la fanfaroninto estas vanaj; en tiu okazo ĝi tre klare montras sian honton kaj malkontenton. Aŭ eĉ hundo sola sin plezurigas sin certigante pri sia lerteco; praktikante, sin admirante, ĝi ĉirkaŭkuras, ripete sin flankenturnante, sin savante de imagata sekvanto. En tiu okazo ĝia absurda seriozeco kaj evidenta fiero pri sia supozata lerteco estas tre anuzaj.

Jus kun interesego mi observis neordinaran pruvon pri tiu inklino ĉe la birdoj — montri, ĝui kaj provi siajn povojn.

Jus alvenis kaj preterpasis tropika ŝtormo mallonge-daŭra sed fortega, tuj-trempa pluvego kun ventego, kiu faligis plurajn arbojn kaj ĉesigis la funkciadon de ĉio elektra en nia urbeto — tiel fortega ĝi estis !

Ekrimarkinte ĝian alproksimiĝon, mi rapidis fermi miajn fenestrojn, kaj, ilin fermante, mi elrigardis super nia golfo al la rapide-alvenanta malhela nubamaso.

Tiam, alte en la aero, mi ekvidis nigran makuleton, maraglon (Pandionon) kiu tie ŝvebis, unu el paro, kiu dum longe nestadis ĉe la supro de proksima marborda deklivo.

Post kelkaj sekundoj la ŝtormego ekfrapos tiun birdon; mi atente observadis, por vidi kiel ĝi agos, kaj kun miro mi rimarkis, ke, kvazaŭ tute indifera, ĝi volas *atendi* la ventegon ! Ĉu ĝi komprenas pri la venanta danĝero ? Sendube jes, ĉar la homoj, la boatoj de la fiŝkaptistoj, kaj ĉiuj aliaj bestoj jam forkuris, serĉante rifuĝejojn, ankoraŭ la aglo facile sin povus ŝirmi en la proksima montaro. Sed tion ĝi ne volis fari, sentime ĝi ŝvebis, defia, dezirante provi sian forton kontraŭ tiu escepta vento.

\*\*

Dum kelkaj minutoj la birdo baraktis kontraŭ tiu ega premado, kiel aviadisto alterne supren kaj malsupren provante trovi pli favoran aerotavolon; sed vane, kaj baldaŭ, aŭ laca, aŭ kontenta pri sia provo, ĝi cedis, ĉesigis sian bataladon, sin turnis, kaj, forportita de la uragano, malaperis kiel sago en la nigreco de la pluvego jam forpasinta en la malproksimon.

## Rido sanigas

### La koncerto.

« Ĉu hieraŭ vi vizitis la koncerton ? » demandis Mia. « Kion vi aŭdis ? »

« Ho, tute multe ! », raportis Lia. « Ge-Dardow'oj eksedziĝos, direktoro Kunzig forkuris kun 50.000 frankoj, la dancistino, la Luypaert, vi scias, ricevis onidire brilantkolieron por 200.000 frankoj de sia amiko, kaj ĉe familio Hahn alvenis dunaskitoj. »

### Post ĉaso.

« Hieraŭ, dum la ĉaso, kuglo flugis rekte super mia kapo. Unu centimetron pli malalta, kaj vi parolus kun kadavro ! »

### Antikvaĵo.

« Mi esperas », skribis juna viro al sia estonta bopatro, « ke mia ĵus realigita ofico ĉe la Muzeo por Antikvaĵoj instigos vin, konfidi al mi vian ŝatatan filinon. »

### Modesta.

— Mi navas nur unu deziron.  
— Vere, tre modesta vi estas. Kaj kian deziron do vi havas ?  
— Kaj ĉiuj miaj deziroj plenumiĝu !

### Se li antaŭe pripensos...

— Neniam mi povus edziniĝi al viro, kiu ne ĉiam antaŭe pripensus, kion li faras.  
— Vi do intencas resti fraŭlino ? !

### Fabliga rimedo.

— Kia estas viaj rilatoj kun via bopatrino ?  
— Dankon, tre bonaj ! Mi fotografas ŝin la tutan tagon — sekve ŝi ĉiam faras afablan vizaĝon.

### Partianoj.

Ekzistas du kategorioj de partiaj politikistoj: tiuj kiuj silentas, kaj tiuj kiuj parolas. La silentantaj neniam mensogas, kaj la parolantaj neniam diras la veron.

### El la lernejo.

Instruisto: Diru, Petro, kial mi nun punis vin ?

Petro (singultante): Tiel forte oni ne batu, se oni mem ne scias, kial !

\*) Ofta grimpoplanto, *Lonicera Periclymenum*.

# LA ESPERANTISTA REKLAMO

## La prezo de anoncetoj

estas egalvaloro de 10 belgaj frankoj aŭ 0.60 ned. guldenon, por la unuaj 20 vortoj aŭ mallongigoj; por ĉiuj pliaj 10 vortoj komencitaj 5 belgaj frankoj aŭ 0.30 guldeno. La anoncetoj aperas en la semajna kaj (laŭ la disponebla loko) monata organoj de Internacia Esperanto-Ligo, nome en « Heroldo de Esperanto » kaj « Esperanto Internacia ». Por mendi anoncetojn, oni turnu sin al la Administracio de **Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando; nederlanda poŝtĝiro 1306.30 ('s-Gravenhage); belga poŝtĝiro 2044.04 (Bruxelles).**

**Naskiĝo.** Al gesinjoroj Ostensen-Huter, **Apeldoorn**, Nederlando, Cseh-metodaj geinstruistoj, naskiĝis filo Henricus Johannes. — Li sanu, kresku, kaj fariĝu fervora esperantisto, kiel la gepatroj!

**Naskiĝo.** Niaj gesamideanoj Luigi kaj Carolina Minnaja, Via dei Fienili 42 F, Roma, Italujo, anoncas la naskiĝon de sia filo Nicola. — Ni gratulas tutkore!

**Geedziĝo.** La 19.12.1937 geedziĝis Imrich Farkaš kaj Lidka nask. Sybová, **Praha**, Ĉeĥoslovakio. La edziĝofesto okazis en la preĝejo de Libuŝin apud Kladno.

**Letervespero** okazos komence de februaro, organizata de: Laborista Esperantista Grupo, 2 Rue Drouin, **Nancy** (Meurthe et Moselle), Francio. — Respondo garantiata al ĉiuj skribantoj.

**Poŝtkarvesperon** okazigos la Stretforda Esperanto-Grupo, **la 8-an de februaro**. Nepra respondo al ĉiuj. Skribu multnombre nur esperantlingve al s-ro G. Burness, 25 Harcourt St., **Stretford**, Manchester, Anglujo.

**Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko** anoncas, ke ĝi translokiĝis en novajn vastajn ejojn, kie ĝi aranĝis sian Centran Oficejon kaj Esperantan Libro vendejon. Nova adreso por ĉiuj sendaĵoj: Esperanto-Asocio en ĈSR, Truhlářská 16, **Praha II**.

**Adresanĝo.** Bonvolu noti mian novan adreson: Maurice Vanderlinden, Kapellestraat 29 C, **Astene/Deinze**, Belgujo.

**Prof. Sygnarski sincere dankas** al ĉiuj (21), kiuj sendis libropremiojn, gratulleterojn aŭ bildkartojn okaze de la kursfiniĝo en la ŝtata gimnazio je la nomo de Marŝalo Piłsudski en Bydgoszcz (Polujo), la 4.12.1937.

**Pri infana Esperanto-literaturo** mi, petinte ricevis kelke da sciigoj de la afablaj samideanoj. Ili bonvolu pacienciĝi, la promesitan libreton ĉiuj ricevos de mi. Faka instruistino Julie Šupichová (Ejš) en **Praha**, Ĉeĥoslovakio.

**Japano** deziras korespondi kaj interŝanĝi, ĉefe pri sportoj, kun ĉiulandanoj kiuj certe respondos. S-ro Hidesato Takahashi, 23 Nanpeidai, Shibuya, **Tokio**, Japanujo.

**Volonte mi korespondus** kun eksterlandaj kolegoj. Pr. fotografisto A. G. Kinof, Kuninga 2, **Tallinn**, Estonio.

**20 gelnantoj de Esperanto-kurso** deziras korespondi. Respondo garantiata. Skribu al Knud Madsen, **Gabrielminde**, Gloslunde, Lolland, Danujo.

**Junulo**, 23-jara, deziras korespondi kun gejunuloj ĉiuaĝaj el la tuta mondo. Respondon garantias s-ro N. Ahlm, Råggatan 4, **Stockholm**, Svedujo.

**Esperantistoj, sendu viajn fotografajojn**, kun via adreso! Ĉiu ricevos multajn fotojn el diversaj landoj *s e n p a g e*. Sendu al: Fot. Antono Indrulis, **Laizuva**, Litovio. (465)

**Sekigitajn fungojn, boledojn** vendas Matouš V., delegito, **České Budějovice**, Ĉeĥoslovakio.

**Norvegujo, Harstad**, O. T. Nicolaisen, Esperanto-instruisto, Storgatan 31, serĉas korespondantojn por siaj gekursanoj. — Li deziras rilaton kun gesamideanoj en Rejnprovinco, Luksemburgo, Norda Francujo, Anglujo, Belgujo, Nederlando, kiujn regionojn li trabiĉiklos al la mondkongreso en Londono. Li ankaŭ serĉas kunbiciklonton.

**Por unu respondkuponon internacia** vi ricevos Esperantan tekston de parolado de japana ĉefministro princo A. Konoje, pri ĉina afero, en Imperia Parlamento, kune kun gazeto « Orienta Kulturo ». Sendu al: Societo de Orienta Kulturo, Komagome-Dozaka 228, **Tokio**, Japanujo.

**80 hungarajn poŝtmarkojn** sendas kontraŭ 80 diversaj vialandaj: Štefano Illés, **Kisorozsi**, Pest m., Hungarujo.

**Deziras korespondi** kun kamaradoj pri temoj ilin interesantaj, precipe pri la terura milito en mia lando. Viktor Santamaria, Esperanta Grupo « Ĉielarko », Strato 11, n-ro 16, **Viladecans, Barcelona**, Hispanujo.

**Bydgoszcz.** Mi bezonas adresojn de tutmondaj geknaboj por miaj 50 gimnazianoj (13-17 jaraj), kiuj deziras interŝanĝi poŝtkartojn ilustritajn, leterojn, poŝtmarkojn. Respondo garantiata. Prof. Sygnarski, Kordeckiego 23, Bydgoszcz, **Polujo**.

**Paŭl Samulionis, Birzai**, Litovujo, deziras korespondi per leteroj, poŝtkartoj, poŝtkartoj ilustritaj kun ĉiulandanoj, pri ĉiaj temoj, nur kun seriozaj personoj. Interŝanĝas poŝtmarkojn kaj fotografajojn. Al neseriozuloj ne respondos. (Kiu *n e p r e* volas ricevi de mi respondon, bonvolu ĉiam aldoni respondkuponon.) Ĉiam afranku filatele!

**17-jara gimnaziano** sveda deziras korespondi kun junuloj tutmondaj. Interesiĝas pri aktualaj problemoj kaj literaturo. Arne Svensson, Kungsholmsgatan 20, **Stockholm**, Svedujo.

**Gvidantoj de daŭrigaj kursoj**, kiuj deziras ricevi *tute senpage* la duan eldonon de la Plena Gramatiko de Esperanto en la redakto de Kalocsay-Waringhien (500-paĝa grandformata libro, kun densa komposito kaj vendoprezo de usonaj dolaroj 2.86), skribu tuj pri tio al la eldonejo Literatura Mondo, Budapest IX, Soroksári ut 38, Hungarujo. (464)

**La Biblio** estas libro plej legata, plej dezirata. Por ricevi *s e n p a g e* parton el ĝi en iu ajn lingvo, skribu tuj al la Domo de la Biblio, Dept. A.B.J., **Genève**, Svislando. (468)

**Por du internaciaj respond-kuponoj** vi ricevas 32-paĝan interesan libron «Vorto Viva» pri la biblio, por unu respond-kuponon biblian studplanon. Ni volonte respondas pri religiajn demandojn. Sveda K.E.L.I., **Kumla**, Svedujo. (454)

**Kvakerismo kaj Paco.** Por senpagaj ekzempleroj de literaturo (Esperanta kaj angla) skribu al Friends Service Council, Friends House, Euston Road, **London N.W. 1**, Anglujo. (432)

**Esperanto-kurso komenciĝis.** Helpu starigi societon, sendante ilustritajn poŝtkartojn, esperantajn gazetojn, fotojn pri Esperantismo, lumbildseriojn, poŝtkartojn, radiajn, fakajn ktp., prelegaĵojn, prospektojn, turismajn broŝurojn, artikolojn, ekspoziciaĵojn, journalojn ktp.! Sendu al: Esperanto-Kurso, Kullaa, Finnlando.

**Esperantistoj ĉiulandaj!** Petu la senpagan prospekton pri nia **internacia perfektiga skriba Esperanto-kurso** por ĉiulingvanoj! Diversaciaj korektantoj (Lingvakomitatanoj). Ĉiu aliĝinto ricevas valoran premion. — Esperanto-Instituto « Isosek », Geleenstraat, 66, **Heerlen**, Nederlando.

**Juna svedo** (24-jara) deziras korespondi. Respondo garantiata. Skribu pri ĉiuj temoj al s-ro V. Edholm, Box 52, **Baggetoro**, Svedlando.

**100 gekursanoj atendas korespondajojn** el ĉiuj landoj. Respondo garantiata. Skribu multnombre al jena adreso: Albert D'Haeyer, Maagdendaelestraat 22, **Oudenaarde**, Belgujo.

**18-jara Rejnlandano** deziras korespondi kun junulinoj, precipe el Belgujo, Nederlando, Luksemburgo, Nordfrancujo. Blondulinoj preferataj. — Pörsch, Gereonsmühlengasse 22, **Köln**, Germanujo. (469)

**Nederlandaj Esperantistoj!** Petu la senpagan prospekton pri nia **skriba kurso por diplomo B!** Ĉiu kursano ricevos premion. La «Isosek»-kurso estas famkonata. — Esperanto-Instituto « Isosek », Geleenstraat 66, **Heerlen**, Nederlando.

**S-ro Joĉaŝien**, No. 14, Lane 169, Carter Road, **Shanghai**, Ĉinio, per tri specoj de ĉinaj poŝtmarkoj (plej oftaj po 100, malpli oftaj po 10, kaj maloftaj — inkluzive de aviadaj kaj memorigaj — po 3 ekzempleroj) interŝanĝas poŝtmarkojn samkvante el ĉiuj landoj. Tio estas por helpo al la Esperantomovado en Sanhajo.

**Gesamideanoj kaj -inoj en la tuta mondo!** S-ro L. Wardowsky, Kosciuszki 3, **Rzeszow**, Polujo, deziras korespondi (letere kun fotografajo) precipe kun fraŭlinoj, kiuj helpas al la juna, kapabla ekonomiisto, juristo kaj ĵurnalisto trovi kian ajn laboron, indifereinte en kiu lando. Edzeco eventuala.

**Komencanto deziras korespondi** kun samideanoj ĉiulandaj. S-ro H. Hellström, Skog, **Skansholm**, Svedlando.

**Rakontoj kaj artikoloj** pri homoj, bestoj kaj aventuroj en Borneo kaj aliaj aziaj landoj, de R. F. Vaughan: « **El Verdavalo** » por 1936; 48 paĝoj kontraŭ 5 internaciaj respondkuponoj. Mendu senpere de R. F. Vaughan, Sandakan, British North Borneo. (370)

**Senpage publikigas adresojn de geknaboj**, kiuj deziras korespondi, la monata infangazeto « La Vojo ». Adreso Redakcio: Marathonweg 15, II., **Amsterdam**, Nederlando. (453)

**Hungara Popola kaj Skolta Kantkolekto** (24 muziknotoj, 60 tekstoj) prezo sv. fk. 0.40 aŭ 1 resp.-kup., ĉe Hungara Skolta Esperanto-Rondo, Nagy Sándor u. 6, **Budapest V**, Hungarujo. (461)

Presejo de Belga Esperanto-Instituto K. S. Antverpeno — Belgujo.